ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 17 [1995/5 — Septembro-Oktobro 1995

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono.) Elektronika poŝto:
don@enkidu.dialix.oz.au
Correspondence Courses: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3½-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto bonvolu kunsendi taŭgan afrankitan adresitan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Limdato por artikoloj por la decembra numero: 18 novembro.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio: P. O. Box 313, Sunnybank Qld 4109
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: P.O. Box 8140, Symonds St., Auckland 1035
Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669
Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj fakso: 09-579 4767
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1003
(Por kotizoj kaj abonoj: vidu paĝon 31.)

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Geedziĝo de Alan Turvey kaj Ĝo Khjung-Mi 3
Raporto pri la 31-a AEA-Kongreso (Ray Ross) 7
Nekrologo: Walter Roland Morris (Rae Grice) 9
Pri Toleremo (Ron Gates) 10
Nekrologo: Malcolm William Ross (Ralph Harry) 14
Nuklea Bombo—Denove (Brian Fox) . 15
Komuna Kongreso AEA-NZEA 1996 . 16
Lingva Angulo (Alan Towsey) 17
Deziras Korespondi 20, 23
Skribas la Legantoj 22
Dialogoj de la Dioj 29

Libroj:

Comprehensive English-Esperanto Dictionary (Benson/Broadribb) 4
The Mystical Chorus (Broadribb/Payne) 24

ENGLISH SUPPLEMENT

GEEDZIĜO DE ALAN TURVEY & ĜO KJUNG-MI



Alan kaj Ĝo renkontiĝis en Januaro, 1994, dum Alan laboris en Japanio. Li vizitis Koreon por ŝanĝi vizon kaj Ĝo estis inter la esperantistoj kiuj gvidis lin. Li restis en Koreo dum tri tagoj. Poste Alan sendis dankleteron al la Koreaj Esperantistoj. Kompreneble, li sendis dankon ankaŭ al Ĝo. Per ilia daŭra korespondado ili povis senti ke ili akordas unu al la alia.

Alan partoprenis la 79an UK-on en Seulo, kaj post tiam ili pli proksimiĝis, kaj vere sentis ke ili estis samideanoj. Finfine ili decidis ke estus bone geedziĝi. Kvankam Ĝo decidis edziniĝi, tamen, pro kontraŭanto el ŝia familio, ŝi havis iom malfacilan situacion en Koreo. Tamen la patro de Alan, kiu bone parolas la Korean lingvon, povis multe helpi komunikadon inter familianoj.

La celo de la paro geedziĝi estis firma, kaj tial ili geedziĝis je la 24a de Julio, 1995 en Koreo.

La ceremonio estis spektaklo, kiun kaj la pli ol cent gastoj kaj turistoj povis ĝui. La Edzo havis longan robon bluan, kaj la edzino estis belega en sia tradicia vestaĵo. Ŝi tenis plektitan beltukon antaŭ si por aspekti kaŝemeta. La patrino de Alan vojaĝis al Koreo. Kvankam ŝi ne parolis pli ol kelkajn vortojn Koreajn, tamen, pro la ĉeesto de ĉirkaŭ 30 diverslandaj esperantistoj, al ŝi ne mankis interpretistoj! La geedziĝa ceremonio estis komplika. Ambaŭ devis kapklini al ambaŭ familioj kaj unu al la alia multfoje. Ankaŭ ili trinkis iom da rizvino kaj akceptis jujubon kaj nukson. Sur la tablo estis kandeloj, vivantaj kokinoj, kaj fruktoj, kio signifas "abundo". Alan havis Korean interpretiston, kiu Esperantigis la instrukciojn. Bonfortune, la paro ne bezonis paroli dum la geedziĝo. Post la ceremonio, Alan surgrimpis ĉevalon, Ĝo engrimpis palankenon kaj procesio sekvis multkolorajn muzikistojn el la ceremonejo.

Post la geedziĝa ceremonio, la patrino de Alan vojaĝis en la suda parto de Koreo kun diversurbaj Esperantistoj. Ekzemple, ŝi vizitis la Ekspo-okazejon Deĝon, la urbon de ŝtal-fabriko Pohang, antikvan belan lokon Kjonĝu ktp. Bonfortune ĉiuj el tiuj urboj havas Esperantistojn.

Nun ili estas en Sidnejo. Ĝo strebas finlerni la lokan lingvon kaj Alan daŭre laboras. ❑

COMPREHENSIVE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

recenzas Donald Broadribb

Comprehensive English-Esperanto Dictionary de Peter J. Benson. El Cerrito CA: Esperanto League for North America, 1995. 607 paĝoj, kun paĝformato proksimume tia kia la paĝoj de nia *ESK*. Bindita: $43, de la AEA Libroservo. Broŝurita eldono ankaŭ haveblas.

Post atendo dum pluraj jaroj, nun finfine la nova *CEED* publikiĝis. Kaj ĝi estas vere havinda; por verkema aŭ konversaciema Esperantisto, ĝi estas plene rekomendata.

Vortaro nacilingva → Esperanta bezonas:

1. Listigi laŭeble ĉiujn familiarajn nacilingvajn vortojn (ĉifoje, anglajn), tiel ke la bezonanto povas facile kaj fidante trovi la Esperantan ekvivalenton. La *CEED* listigas proksimume 30 000 kapvortojn anglalingvajn, kaj laŭ mia takso proksimume 150 000 apartajn anglalingvajn vortojn kaj esprimojn. Ĝi estas la *sola* plenampleksa angla-Esperanta vortaro.

Ekzistas du vidpunktoj inter Esperantistoj rilate al vortprovizo. Unu estas de personoj kiuj opinias ke la nombro da Esperantaj vortoj devas esti kiel eble plej malgranda. Kutime ili pravigas tiun vidpunkton per la pretendo ke Esperanto-uzantoj plejparte estas lernantoj, kaj ankaŭ ke Esperanto devas esti "facila" lingvo.

Ili opinias ke la 4000+ radikoj jam oficialaj pli ol sufiĉas por la lingvo, kaj ke plejparte "neologismoj" (= neoficialaj vortoj) devas manki.

La alia vidpunkto estas ke en Eperanto devas ekzisti ĉiuj nuancoj esprimataj en ĉiuj nacilaj lingvoj. Laŭ ili, do, Esperanto bezonas esti la plej vortoriĉa lingvo de la mondo. (Rüdiger Eichholz esprimis ĉi tiun vidpunkton por pravigi la karakteron de sia perkomputila terminaro nomata *Pekoteko*.)

Krome, multaj Esperantistoj opinias ke estas dezirinde aŭ eĉ dezirende ke ĉiu Esperanta radiko/vorto havu nur unusolan signifon.

Neniu el la tri supraj vidpunktoj estas "oficiala", nek troviĝas en la *Fundamento de Esperanto* nek en la pensaro de Zamenhof. Pro tio, la tri skoloj arde interbataladas—kio pligrandigas nian literaturon kvankam malmulte pliriĉigas ĝin.

La *CEED* preferas mezan vojon inter tiuj vidpunktoj. Ĝia kreiĝo konsistis el trakribro de *Plena Ilustrita Vortaro*, por trovi kaj prezenti la anglalingvajn ekvivalentojn por ĉiu radiko en *PIV*. Do ĉiuj 15 000 radikoj en *PIV* troviĝas en la nova *CEED*. Ĉi-rilate, la *CEED* estas pli konservativa ol la Esperanto-angla vortaro de M. C. Butler, kiu inkludas multajn radikojn ne troveblajn en *PIV*.

Personoj kiuj malfavore kritikas *PIV*-on rilate al multaj el ĝiaj neologismoj do simile volos kritiki la novan *CEED*.

Personoj kiuj amas neologismojn ne troveblajn en *PIV* (ekzemple, "brodkasti") malkontentiĝos pro la nova *CEED*. La nova *CEED*instruas nur ĉ. 150 neologismojn netroveblajn en *PIV*, kaj aparte difinas ilin en apendico por interesatoj. En la ĉefparto de la vortaro tiuj ne-*PIV*-aj vortoj est-

as speciale signitaj per asterisko.

Tio en la praktiko signifas ke la *CEED* rekomendas la uzadon de ĉiuj vortoj en *PIV*, ĉu oficialaj, ĉu neoficialaj.

2. Vortaro nacilingva → Esperanta bezonas fidinde disponigi vortojn por la Esperanto-lernanto kaj -uzanto, ĉu sperta, ĉu nesperta.

"Fidinda" ne estas ĉiu Esperanta vortaro. Tre grava manko de ĉiuj ĝisnunaj anglaj→Esperantaj vortaroj estas ke ili prezentas sendistinge kaj ĝenerale uzatajn Esperanto-vortojn kaj novajn proponaĵojn de la vortarverkinto mem. Tiel la uzanto tute ne povas scii ĉu elektita vorto efektive jam ekzistas en Esperanto kaj estos komprenata de la legontoj aŭ aŭdontoj.

CEED plejparte evitas ĉi tiun faligilon, ĉar ĝi signas ĉiujn ne-*PIV*-ajn vortojn, kaj la nombro da ili estas ne tre granda. Verŝajne pluraj Esperantologoj preferus ke tiuj vortoj ne inkludiĝu en vortaro uzota de komencantoj. Tamen, direndas ke plejparte ekzistas bonaj kialoj por ilia inkludo, la plejmulto el ili estas teknikaj (zoologiaj, kemiaj, geografiaj) terminoj kiujn komprenos personoj en tiuj fakoj.

Sed ni konsideru ankaŭ ĉi tion: La *PIV* estas tre multekosta volumo (trioble pli altpreza ol la *CEED*!). Tial la plejgranda parto de la Esperantistaro ne posedas kaj ne povas posedi ĝin. Pro tio, mi bedaŭras la mankon de indiko en la *CEED* pri kiuj vortoj estas oficialaj kaj sekve troveblaj en la naciaj Esperanto-vortaroj ĉie en la mondo. Oni *ne* rajtas fidi ke ĉiu vorto uzata (do, en la praktiko, rekomendita) en *CEED* estas komprenebla por ĉiu Esperantisto. Pedagogie kaj praktike estas tre dezirinde ke estontaj eldonoj de *CEED* signu la oficialecon de ĉiuj oficialaj vortoj, kaj klare ekspliku kion tio signifas.

Ni ne rajtas fidi ke ĉiu Esperantisto jam de sia instruisto aŭ sia lernolibro estas informita pri kiuj vortoj estas oficialaj. Same ni ne rajtas fidi ke ĉiu Esperantisto komprenas kio estas la *Fundamento de Esperanto* kaj kio estas ĝia signifo, nek kio estas la "Oficialaj Aldonoj" kaj kion ili signifas. (Preskaŭ neniu lernolibro informas pri la *Fundamento*, la Akademio, aŭ la oficialeco de vortoj—kaj ankaŭ en la *CEED* mankas eĉ mencieto!)

Estas interese kompari ĉi tiun *CEED*-on kun la *Esperanto-Angla Vortaro* de M.C. Butler. Ili komplementas unu la alian tre plaĉe. Rilate al mallongigoj, *CEED* estas multrilate pli uzebla. Kvankam mallongigoj en ĝi estas tre multaj, ofte ĝenaj, kaj kelkfoje cerbumigaj, ili estas eksplikitaj en la unua parto titolita "About This Dictionary".

Unu kritiko tre grava, tamen, estas ke la tipografio estas tre malfacile legebla. Mi represas la ĉisekvan tute tipan alineon plej precize:

> **feel,** (have sensation or emotion, senti [tr]; ~o (e.g.: *I feel sand in my shoes:* mi ~as sablon en miaj ŝuoj; *how do you feel about that idea?:* kiel vi ~as pri tiu ideo?; *I feel sick:* mi ~as (min) malsana); (give impression), impresi [tr] (-e) (e.g.: *the air feels cold:* la aero impresas malvarme) [see also "feel like" below]; (grope, palpate), palpi [tr]; palp(ad)i (e.g.: *feel one's way through the dark:* palpi sian vojon tra la mallumo; *do it by feel:* fari ĝin per palpado); **feeler,** (as on insect), palpilo; (to sound out opinion, reaction, etc.), sondilo; **feeling,**

(a sensation), ~o; (basic sense), ~ivo; (emotion), ~emo, emocio; **feel like,** (give impression of), impresi kiel (e.g.: *that feels like rubber:* tio impresas kiel kaŭĉuko); (be inclined to), emi[tr], inklini [int] (al)

Dum la preparado de *CEED* Peter Benson petis plurajn specialistojn komenti, kritiki, kaj korekti la tekston. Inter ili estis Ralph Harry, kaj Peter Benson atentigas ke li multe utiligis la *Australian-Esperanto Dictionary* de Ralph Harry kaj Volo Gueltling, kion li agnoskas sur p.2. Mi rimarkis ke li ankaŭ utiligis plurajn miajn proponojn (sen mencii tion). Sekve, unuafoje multaj Aŭstraliaj (kaj Nov-Zelandaj) signifoj estas inkluditaj, i.a. la speciala signifo de "tea" (= vespermanĝo[1]); la nomo "paramelo*" Australian bandicoot, (la indiko * signifas ke tiu nomo ne troveblas en *PIV*); "outback" (kiun li Esperantigas per "landinterno", malpli sentimpresa ol nia pli familiara traduko per "forforejo", sed multe pli facile komprenata de eksteraŭstralaziulo); "station" ("ranĉo, brutbieno"); "bloke" ("ulo", kvankam ofte pli preciza traduko en Aŭstralio estas "vir(seksul)o".

Ne ĉiu naciismo estis inkludebla, ĉar eĉ 150 000 vortoj kaj esprimoj ne elĉerpas la tutan anglalingvan uzaĵaron. Mankas, do, "lollies" (dolĉaĵoj).

Kelkfoje la deziro koncizigi la tipografion malebligas al la uzanto trovi deziratan terminon. Serĉanto tre malfacile trovos Esperantigon de "pedestrian crossing". Sub "cross" *CEED* donas:

cross, (any X-shaped thing or symbol), kruco; (make any cross; cross-breed), ~i [tr]; (go across), transiri [tr], transpasi [tr] (e.g. *cross the street:* transiri la straton);(go through), trairi [tr], trapasi [tr] travojaĝi [tr] (e.g. *cross the prairies:* trairi [or travojaĝi etc.] la preriojn); (line across), transstreki [tr]; (oppose), kontraŭi [tr]; (contrary), kontraŭa; (angry), kolera; [see also "cross-"]; crossing, (roads etc.), ~ejo; (cross-breeding), ~aĵo, hibrido; **crossbar,** (any transverse bar) trans-stango; **crossbars,** (latticework), krado; **crossbill,** (zool], loksio, ~bekulo; **crossbow,** arbalesto; **cross-country,** (not on roads), trakampa; (across nation), trans-

kaj la alineo daŭras ankoraŭ 32 liniojn pli. Mi suspektas ke vi ne trovos el tiu komplikaĵo ke la ĝusta traduko por "pedestrian crossing" estas "(piedira) transirejo". Kaj vi verŝajne kredos ke "transiraĵo" estas ĝusta traduko de "cross-breeding"...

Se la problemo limiĝus al nur kelkaj listigoj en la verko, ni povus nomi ĝin bedaŭrinda sed negrava. Tamen, tiom ofta ĝi estas en la *CEED*, ke necesas diri ke kmomencanto aŭ eĉ ne-tre-talenta progresanto verŝajne senespere eltiros siajn kapharojn kaj turnos sin al pli facile uzebla libro; kio estas vere domaĝa, ĉar neniu alia vortaro Angla-Esperanta tiom fidindas kaj informas.

Nu, ĉiu ampleksega verko enhavas pens- kaj kompost-erarojn, negrave kiom zorge oni tralegis ĝin antaŭ la preso; ankaŭ *CEED* enhavas erarojn kaj ne-vere-geniajn solvojn por ŝovi tiom da teksto en nur 600 paĝojn. Malgraŭ tio, serioza studanto de Esperanto trovos ĉi tiun vortaron valorega. Mi do rekomendas al vi aĉeti ĉi tiun verkon. ❑

[1] Li tiel korektas Butler, kiu inkludis la idiotismon "te-manĝo", nekomprenebla ekster Aŭstralazio kaj Britio.

RAPORTO PRI LA 31-a KONGRESO DE AEA

De Ray Ross

Ĉi tiu Kongreso okazis la 30an de junio ĝis la 6a de julio, 1995, en Southport, la ejo estis The Southport School. Tre plaĉis al la ĉeestantoj ĉiuj aspektoj de la kongresejo, kaj malgraŭ negranda nombro da aliĝantoj (aliĝis 48, 46 ĉeestis), vera familia etoso regis dum la sep tagoj.

La informo ke 10 delegitoj el Ĉinio ne povis ĉeesti pro rifuzo de vizoj far nia Registaro, malgraŭ interveno kaj propono de nia prezidanto ke la koncerna Fako (Migrado) rekonsideru tiun decidon, ne plaĉis.

Interkona vespero: okazis vendredvesperon en komforta komunĉambro kiam iom da kutimaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj bonvenigis la partoprenantojn.

Oficiala Malfermo: La prezidanto, Kep Enderby, prezidis en la ĉambro-Zamenhof (Memoriga ĉambro en la kolegio), kaj la prezidanto de la Kvinslanda Parlamento, Jim Fouras, malfermis la Kongreson; dum la malfermo li tributis al la multkultura aspekto de Esperanto, kaj menciis ke li mem, kiel juna knabo, migris al Aŭstralio (Southport), kie li studis en The Southport School dum kelkaj jaroj. Jim Fouras ankaŭ, post peto de nia prezidanto, tutkore konsentis esti unu el la Patronoj de la UK 1997 en Adelajdo.

Sekvis salutoj al la kongreso fare de delegitoj el ĉiuj Grupoj en Aŭstralio, kaj por Nov-Zelando de Frank Swift, el Christchurch. La Brisbana Kantgrupo prezentis la bone konatan poemon de Zamenhof, "La Vojo", antaŭnelonge muzikigitan.

Sekvis la kongresfotoj; dank' al Phil Thompson, taŭge aranĝitaj kaj haveblaj post du horoj al la anoj.

Joyce Turner distris/instruis per kasedoj en la komunĉambro, posttagmeze.

Sabatvespere okazis la kantkonkurso por la Muller-Soraŭ Ŝildo, kiam la Brisbana Kantgrupo prezentis kvar kantojn: Kara Bara Wira Kana, La Longa Blanka Voj', Eble Am', kaj Ĉu la Homojn Aŭdas Vi?.

Sekvis duonhora prezentado fare de la Gold Coast Harmony Group, angle. **La Brisbana Grupo** kantis Hispan-devenajn kantojn festivalstile. **Ralph Harry** prelegis pri *Mi Memoras Hiroŝimon* ; Esperanto-traduko haveblas ĉe la Libroservo. **Mavis kaj Tom Elliott** starigis ĉi tiun servon, kun adekvata stoko da libroj ktp en taŭga klasĉambro.

Dimanĉe, Peter Keates plensukcese aranĝis pri **Ekumena Diservo**, kiam Annie Spencer prezentis la Unity-Kredon. Vespere, **Ronald Gates** majstre prelegis pri la kongrestemo, Toleremo, (vidu apartan raporton en *ESK*). Poste, la **Brisbana Dramo-Grupo** konkursis por la Herbert Koppel Ŝildo, per "Lando de la Naskotoj". **Ralph Harry** tributis al Unuiĝintaj Nacioj per "UN festas pri 50 jaroj", kaj disdonis sufiĉe ampleksan brosuron "Agnoskante la atingojn".

Marcel Leereveld estris Lingvan Seminarion, dum kvar matenperiodoj; dankon al Marcel pro tiuj pensinstigaj sesioj!

AEA-Kunveno: La prezidanto,

Kep Enderby, malfermis la kunsidon, kaj invitis la anojn stari, memore al tiuj kiuj forpasis dum la pasintaj dekok monatoj: Dorothy Harry, Karl Gunster, kaj Vlado Kosef. La kunveno akceptis pardonpetojn de neĉeestantoj, kaj akceptis raportojn de: Sekretario Ray Ross; Kasisto Owen Loneragan; Helpkasisto Dianne Lukes; Libroservo, Tom Elliott; Korespondservo, Betty Aulsebrook; Korespondkursoj, John Moore. La kunveno adoptis la proponon de la Estraro, ke estrado de la Fonduso Idyss Einihovici por la Esperanto-edukado kaj Vojaĝado de Infanoj estu sole en la manoj de S-ino Einihovici kaj la tri kuratoroj. Por faciligi la taskon de la Kasisto la estraro proponis ŝanĝon al la Statuto, regulo 6, rilate al Administra Jaro: al "la Administra Jaro estas la Financa Jaro." Por ĉi tio necesas voĉdono far la membroj de AEA, do voĉdonilo atingos anojn en la venonta eldono de *ESK*. Financo: estis decidite ke $3 el ĉiu abonkotizo al AEA estu rekta kontribuo al la *ESK*-Fonduso, por aĉetado kaj riparado de komputilaparatoj kiel necese. Vespere okazis vigla distraĵprogramo, skeĉlegado, komunkantado ktp.

Marde: La kunveno elektis novan estraron, jene: Prez. Kep Enderby; Vicprezidantoj, Max Wearing kaj Ronald Gates; Sekretario (provizore), Alan Turvey (Ray Ross daŭrigos la oficon ĝis Alan revenos el Koreo). Help-Sekretario, Jennifer Bishop; Kasisto, Owen Loneragan; Help-Kasisto, Dianne Lukes. La Prezidanto tributis al Vera Payne, kiu ne deziris rekandidatiĝi.

La sola ekskurso, al Avokado-Plantejo, okazis posttagmeze; ege interesa turistejo/instruejo, kie troviĝas pli ol 550 specoj da fruktarboj, inkluzive de unu el la epoko de la Inkaoj, preskaŭ perdita de la homaro.

Vespere, Ron Gates estris sesion pri verkado de noveleto—laŭ antaŭelektita komencolinio; post sperta konsilo, la 13 anoj kiuj preparis verkon laŭtlegis propran eron. La rezulto de tiu sesio aperos en speciala eldono post nelonge. Daŭrigo de tiu temo okazis la sekvan vesperon, el alia vidpunkto, kiam grupe sep apartaj frazoj finfine aperis kiel rakonteto— kompreneble neserioza. **Marcel Leereveld** montris diapozitivojn pri antikvaj aspektoj de urbo en Jordano, ege interesplena kaj instrua sesio pri la historio de tiu antikva lando, nuntempe turista allogaĵo.

Merkrede: okazis tut-taga kunsido pri ĉiuj diversaj aspektoj de la 1997a UK en Adelajdo. La kunsido gratulis al la LKK kaj la aliaj helpantoj pro la ĝisnuna progreso, sed ĉiuj komprenas ke restas multe da laboro kaj sindediĉo por sukcesigi la kongreson. Kontentiga subtenado far la kunsidanoj estis evidenta, kaj esprimo de kunhelpo fare de la anoj certe aŭguras sukceson.

La Bankedo: ĉar la prezidanto, Kep, devis foriri iom frue (li eksterlandenis por la kongreso de SAT, kaj por la UK en Tampero), Max Wearing estris la Bankedon. Bonega manĝaĵo, iom da trinkaĵo ktp certigis sukceson de la bankedo. Tosto al Zamenhof, kaj tosto al la LKK-anoj, kiuj multe laboris, sekvis; jen la anoj: Gaye Phillips, Kay Andersen, Peggy Ross, Mina Spork, Connie White, Cath Sullivan, Annie Spencer, Joyce Turner, Dianne Lukes, Lillian Newman, Sandra Connors, Jay Grant, Caroline

Turner, Tom O'Grady, Joff Bell, Phil Thompson, Merv Schramm, Peter Keates, Bruce Dwyer, Ray Ross. Max prezentis la Muller-Soraŭ-Ŝildon al Kay Anderson, por la Kantgrupo; la Herbert Koppel-Ŝildon al Gaye Phillips, por la Dramo-grupo. Ray Ross, por la LKK, simbole donis Esperanto-flagon al Frank Swift, Christchurch. La sekvonta Kongreso, de AEA+ NZEA, okazos en Auckland, 3-9 januaro, 1996. Aliaj kontribuantoj al la distraĵprogramo estis: Kam Lee, Bob Felby, Alan kaj Jennifer Bishop, per Mazi kaj ekspozicio de Ekparoli; kaj Jim Jones. Fakte preskaŭ ĉiu kongresano kontribuis/partoprenis dum la semajnfino; vera familio-kongreso! ❑



Sep Junaj Aŭstralianoj

atendas vin!

Ĉu vi legis la entuziasman recenzon verkitan de Vera Payne kaj aperintan en nia lasta numero? Tie estis dirite ke ne eblas aĉeti la tradukon far Ruth McGrath de ĉi tiu fama romano...

Sed nun ŝia traduko ja estas havebla! Vi povas aĉeti ĝin de la Libroservo de AEA. La prezo estas $22.50.

WALTER ROLAND MORRIS

Mi skribis ĉi tion je la naŭa de junio, la naskiĝtago de Walter Roland Morris, kiu forpasis je la 1 junio.

Roy fartis sufiĉe bone post la amputiĝo de sia kruro, pro kiu li loĝis en hejmo por maljunuloj. Ĉar li povis tiutempe moviĝi nur per radseĝo, li komencis trovi sian vivon pli kaj pli limigita. Sed ankoraŭ multe interesis lin skribi kaj ricevi leterojn de amikoj en la tuta mondo. Kiam mi lastafoje vizitis lin, li petis min enpoŝtigi leteron al lia fratino en Anglio, kie li naskiĝis. Dum lia funebra solenaĵo, la estrino de Lake Heights diris ke alvenis tiutage tri leteroj por Roy el diversaj partoj de la mondo.

Kiam li eliris la lernejon en Manchester, Roy komencis labori ĉe Cooks Travel, sed baldaŭ li sopiris mem vojaĝi, kaj li pasigis kelkajn tagojn en Francio. Tiel li malkovris sian tutvivan interesiĝon. Li trovis postenon kiel ŝipano, kaj neniam denove li loĝis en Anglio. En 1994 li decidis hejmiĝi en Nov-Zelando, sed liaj vojaĝoj daŭris. Precipe plaĉis al li partoj de Usono, tamen lia preferata lando estis Rusio. Li havis fortan kunsenton kun la popoloj, kaj jam sufiĉe facile parolis per la Rusa lingvo.

Oni multe ĝuis paroli kun Roy. Li rakontis longajn kaj tre interesajn historiojn pri la homoj kiujn li renkontis, kie, kiel, kaj kial. Ofte ili helpis lin eskapi de malfacilo — ekzemple, kiam en Aŭstralio li forlasis kontraŭleĝe sian ŝipon kaj devis rapidi al Nov-Zelando!

Roy amis forte la naturon, aparte, kompreneble, la maron, sed li ne havis religian kredon. Tamen li estis tre fiera pri sia fratino kiu estis monaĥino en Aŭstralio. Estas bone scii ke li povis paroli telefone kun ŝi antaŭ sia morto. ❑

PRI TOLEREMO

prelego pri la kongresa temo, okaze de la AEA-kongreso junio-julio 1995
de Ron Gates

Inter la libroj kiujn mi legis dum mia junaĝo, troviĝas unu titolita, se mi ĝuste memoras, *I Believe*—tio estas, *Mi Kredas*. Ĝi konsistis el kolekto da eseoj en kiuj pli-malpli eminentaj individuoj prezentis siajn personajn filozofiojn. Bedaŭrinde ne restas en mia memoro la nomoj de la kontribuintoj. Forflugis ankaŭ tio kion ili skribis pri propra moralo, escepte de unu izolita punkto.Unu el la verkintoj ilustris sian sintenon rilate aliajn homojn per anekdoto kiu evidente faris sur mi impreson. En senluna nokto li stiris sian aŭton laŭ kampara vojo. Venis rapidege en la kontraŭa direkto alia veturilo, kies stiranto nek malakcelis nek mallevis la frontajn lumojn. Estus pardoneble se la rakontanto signalus sian ĉagrenon per fulmigo de propraj reflektoroj kaj eble per hupado. Tion tamen li ne faris. Li diris al si ke eblas ke la alia aŭtisto havas validan motivon por sia ŝajna egoismo: ekzemple, li povus esti kuracisto rapidanta al urĝa kazo. Do nia heroo rezignis pri ia protesto. fl

Tiu rakonteto ekzempligas unu formon de toleremo, tiu kvalito kiu estas la temo de la nuna kongreso. Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, "toleremo" signifas "inklino(n) allasi ĉe la aliaj pens- aŭ agmanierojn, kiujn oni ne uzas aŭ aprobas mem". Nu, kiel vi sendube scias, nia kongrestemo estis elektita pro tio, ke Unuiĝintaj Nacioj proklamis ĝin la fokuso de la jaro 1995 en la serio da "internaciaj jaroj"; kaj bedaŭrinde, Esperanto ankoraŭ ne ĝuas rekonon kiel unu el lingvoj oficialigitaj de tiu organizo. Sin prezentas do la demando, ĉu ni trafis en nia lingvo la terminon kun la ĝusta signifo?

Nu, en la angla ni havas la vorton *tolerance*, kaj en la franca *tolérance*; kaj, inter la neoficialigitaj lingvoj, en la itala troviĝas *tolleranza* kaj en la germana *Duldung* aŭ *Toleranz*. Kaj ĉiu el tiuj substantivoj havas signifon similan al tiu de "toleremo", eĉ se la vortaroj ne esprimas ĝin tiel elegante kiel *PIV*.

Mia scio ne etendiĝas ĝis aliaj lingvoj. Ŝajnas, tamen, ke "toler" estas radiko internacia. Kaj ankaŭ internacia, tio estas ĉie-okazanta, estas la mala fenomeno, netoleremo. En sia pravigo de la proklamado de 1995 kiel la jaro por toleremo, Unuiĝintaj Nacioj rimarkigis ke konfliktoj etnaj, kulturaj, religiaj kaj sociaj plimultiĝas kaj pli disvastiĝas. Tion ne povas ne konstati ĉiu kiu televidas la novaĵbultenojn aŭ legas la ĵurnalojn. Kaj tiaj konfliktoj ne konsistas nur el disputado parola, aŭ polemiko, aŭ eĉ interŝanĝo de insultoj. Grupoj fizike interbatalas, kaj multaj homoj, se ili ne perdas la vivon, estas elpelataj el siaj hereditaj loĝlokoj.

Oni povas tamen diskutesplori, en kia grado manko de toleremo estas per si mem la kaŭzo de la konfliktoj, kaj en kia grado ĝi estas nura rimedo uzata de homoj alie motivitaj.

Konsentite, en ni ĉiuj troviĝas denaske ia triba instinkto, kiu inklinigas nin al suspekto kaj malamikeco kontraŭ fremduloj. Sed egale profunde enplantita en la mensa ekipaĵo

de multaj el ni estas instinkta deziro eĉ pli dangera, regi aliajn homojn. En la historio, kaj en la ĉiutage malvolviganta kroniko de la nuna tempo, rolas elstare sinsekvo de militaj diktatoroj kaj alispecaj despotoj. Eĉ en la demokratioj ne mankas individuoj kaj organizoj kiuj, atinginte regadon, subordigas ĉiun alian konsideron al la reteno de povo, por ke ili plue guu giajn fruktojn.

Tiuj kiuj ektenas la kondukilojn, ĉu per forto, ĉu per elektado, ofte trovas ke estas pli facile kapti kaj konservi lojalecon, se oni inspiras al la popolo antagonismon kontraŭ supozaj malamikoj komunaj, ĉu judoj, ĉu kapitalistoj, ĉu komunistoj, ĉu enmigrintoj, ĉu alireligianoj, ĉu rivala futbalteamo. Tiel la regantoj ekspluatas la enradikigintan inklinon al netoleremo. Ili elvokas fantomajn minacojn kaj estigas suspekton kaj timon. Negrave se la sekvo estas fizika konflikto.

Kiagrade en tiaj okazoj respondecas netoleremo, kaj kiagrade regemo? Kia ajn la respondo al tiu demando, la rezultoj de la kombinajo bedaŭrinde abundas. Laŭ grupo de reserĉistoj ĉe Universitato de Upsalo, okazis en la mondo ekde 1989 gis 1994 almenaŭ 90 armaj konfliktoj, el kiuj nur kvar estis inter apartaj ŝtatoj. Unuigintaj Nacioj, eksplikante sian elekton de toleremo kiel la temon por 1995, diris ke etnaj konfliktoj, disigo de ŝtatoj, kaj la erupcio de religia netoleremo nuntempe pliseverigas mizeron, kaj malstabiligas pacan disvolvigadon, en multaj partoj de la mondo.

Unu rezulto estas daŭra fluo de rifugantoj, al kiu oni devas aldoni tiujn homojn kies elmigrado estas malpli mizera sed ne malpli kaŭzita de antagonismo kaj persekutado. Se akcepti taksadon fare de Unuigintaj Nacioj, la nombro da rifugintoj kaj homoj delokitaj de armaj konfliktoj nun alproksimigas al 49 milionoj.

Usono, ekde la albordigo de la pilgrimoj el *Mayflower* antaŭ 375 jaroj, ricigas de ondo post ondo da homoj fugintaj de netoleremo kaj persekutado. Simile Aŭstralio en la lastaj 50 jaroj. Laŭ nia nacia komisiono por Unesko (en kiu mi prezidis de 1981 gis 1983), neta enmigrado en nian landon ekde 1947 averagas po 82,000 en jaro, sumigante do al preskaŭ kvar milionoj. Kaj multaj el la alvenintoj, eble eĉ la plimulto, estis en ia senco rifugantoj. Ili kunportis ne nur energion, sed ankaŭ rasan kaj kulturan diversecon. El tiuj trajtoj ni ĉiuj gajnis. Kiel diras Unesko, diverseco ricigas nian mondon kaj estas motoro de progreso.

En Aŭstralio, samkiel en Usono, okazis neeviteble, ĉe la jama logantaro, iomete da suspekto kaj antagonismo pro diferencoj rilate aspekton, lingvon, kaj kutimojn. Felicе, eĉ ekde la komenco, tiu fenomeno ordinare sin montris nur neserioze. Eble en la aŭstralia karaktero trovigas trajto relative nepostulema—tio estas, tolerema. Laŭ tradicia onidiro, mankas al ni certa intenseco. Se tia emo vere ekzistas ĉe ni, gi estas sendube atribuebla grandparte al tio ke, malgraŭ nia sperto dum la dua mondmilito, ni sentas nin pro izoleco relative sekuraj kontraŭ atako el ekstere. Ĉiaokaze, kia ajn la ekspliko, ŝajnas ke ni prezentas ne tre fekundan grundon al tiuj kiuj celas povon per ekspluato de netoleremo.

Tia, almenaŭ, estis longatempe la situacio. Bedaŭrinde dum la lasta jardeko gi iom ŝangigis. Ŝajnas al

mi ke aŭstralianoj pli kaj pli inklinas ne nur parole kondamni pens- aŭ agmanierojn kiujn ili ne uzas aŭ aprobas mem (se ripeti la difinon el *PIV*), sed ankaŭ uzi la potencon de la ŝtato por prohibi la koncernajn vortojn aŭ agojn kaj por puni la malobeantojn. Ekestis nova doktrino angle nomita *political correctness*—tio estas, "politika ĝusteco" aŭ, eble pli trafe, "politika konformigo"—kies eroj rilatas malpli al la bono de la tuta komunumo, ol al la donado de rajtoj kaj avantaĝoj al iuj grupoj je la kosto de aliaj. Ofte tio kion la leĝo transdonas havas materian valoron. Kelkfoje ĝi estas simple parto de la libereco pensi, paroli, kaj agi laŭ propra moralo kondiĉe nur ke ni ne malpliigas la rajton de aliaj agi simile. La ĉefaj proparolantoj de politika konformigo estas aŭ zelotoj kiuj konvinkiĝis ke ili scias kio estas plej bona por aliaj, aŭ individuoj aŭ grupoj kiuj ĝuas el la nova ortodokseco materian avantaĝon.

Por priskribi tiun fenomenon, iu lastatempe inventis en la angla lingvo la terminon *soft totalitarianism* —tio estas "mola totalismo". Tia altrudo de konformeco ne konstituigas la plej malbonefikan elmontriĝon de netoleremo. Tamen ĝi estas rezistenda, ne malplej pro tio ke ĝi povas konduki al pli gravaj misuzoj de aŭtoritato.

Interesis min legi antaŭ du-tri monatoj priskribon de *Australian Broadcasting Corporation*, fare de la prezentanto de ĝiaj dissendoj pri libroj kaj verkado. Li diris, "La politika konformigemo de *ABC* estas eksterordinara. Estas neniu libero pri io rilate rason aŭ genron (per tiu gramatika termino li intencis "sekson") aŭ politikon. Estas nur unu sinteno, kiun oni povas havi koncerne aborigenojn, multkulturismon kaj feminismon." Li aldonis, ke *ABC* estas ege ordonema organizo, kaj ke li mem, kiu kontraŭstaras ordonemon, devas tajli tion kion li diras laŭ la reganta ideologio.

Tio ne estas nova fenomeno. Mi mem spertis ĝin antaŭ preskaŭ tri jardekoj. Dum multaj jaroj mi rolis kiel tiel nomata eksperto ĉe radio kaj televido por la tiama *Australian Broadcasting Commission*. Mi regule liveris novaĵrilatajn paroladojn kiujn ni karakterizis kiel *think-pieces*—tio estas, "pensigajn pecojn". Post kiam mi translokiĝis de Sidnejo al Brisbano, la dissendaĵoj estis registrataj en Sidnejo pere de telefona lineo el la brisbana studio, unu-du horojn antaŭ la disaŭdigo. Mi kutimis de mia domo aŭ mia oficejo telefone sciigi la direktoron de prelegoj en Sidnejo pri la temo pri kiu mi intencas paroli. Unu matenon mi informis lin ke mia manuskripto temas pri certaj ĵus okazintaj agoj de *ABC* kaj de *British Broadcasting Corporation*, kiuj agoj pensigas pri la respondecoj de komunikiloj financataj de la publiko. Ne estas troige diri ke li panikiĝis. Li absolute malpermesis ke mi traktu tiun temon. Mi rapide verkis novan tekston pri alia subjekto, kaj post la registrado anoncis ke mi ne plu parolos ĉe *ABC*.

La mondo estus malpli interesa, eĉ enuiga, se ni ĉiuj pensus, parolus, kaj agus laŭ similaj vojoj. Ni devas do ĝoji ke ekzistas en nia komunumo diverseco. Sed tiu diverseco povas ankaŭ estigi sentojn de malakordo kaj malamo inter grupoj difinitaj per deveno, raso, lingvo, religio, kaj tiel plu. Ni prave kondamnas la pli krudajn esprimojn de tia malamo. Ĉu do (kaj

la demando estas aktuala) ni devus deklari tiuspecan parolon krimo punenda de la ŝtato? Ĉu ni rajtas pluiri, kaj malpermesi ĉiun eldiron kiu povus ofendi membrojn de identigebla grupo? Ĉu, proklaminte publikan moralon, ni rajtas postuli konformiĝon sub leĝa puno? Alivorte, ĉu la dezirindeco de toleremo ne etendiĝas ĝis la tolero de netoleremuloj?

Miaopinie, estas nepre necese lasi libera la esprimon de sentoj kondiĉe nur ke la konduto ne malobeas la dum jardekoj evoluintan regularon rilate malutilon faritan al aliaj. Tiel prezentiĝas al malkonsentantoj la okazo fari raciajn kontraŭargumentojn, kaj ordinaraj homoj povas juĝi. Krome, oni tiel malpliigas la danĝeron ke bigotoj, senigite je la rajto paroli, sin turnos al agado.

Ni ankaŭ ne forgesu la potencon de humuro kaj moligi koleron en aliaj (la funkcio tradicie asignita al muziko), kaj moderigi strebitecon en ni mem. Interesis min lastatempe legi en ĵurnalo leteron pri toleremo, kies aŭtoro skribis interalie, "En Okcidenta Eŭropo antaŭ la milito la plej tranĉaj ŝercoj rilate la perceptatajn neperfektaĵojn de la juda popolo estis faritaj de judaj komikistoj kaj ŝatitaj egale de judoj kaj nejudoj." Ridado unuigas homojn.

Ne estas ĉiam facile toleri la netoleremulojn.

Antaŭ kelkaj semajnoj mia edzino kaj mi ĉeestis bankedon festantan la 75-an datrevenon de la establo de la aŭstralia komitato de universitataj estroj, al kiu estis invititaj la ankoraŭ vivantaj eksestroj kaj iliaj partneroj. La festo okazis en impona halo ĉe Universitato de Sidnejo, fakte, la antaŭa legohalo de Biblioteko *Fisher*. La organizintoj faris la eraron inviti kiel postmanĝan preleganton la federalan ministron pri edukado. Dum ni ĝuis bonegajn pladojn, vinon, kaj rememorojn, grego da supozaj studentoj invadis la halon kaj marŝis tien kaj reen inter la tabloj, frapante tamburon kaj ĉantante, iuj el ili per laŭtparoliloj. Tio daŭris plenan duonhoron, ĝis ili finfine eliris kun la ripetita krio, "Ni revenos." Pri kio precize temas la manifestacio, ne estis evidente, kvankam ŝajnis ke la grego postulas pli da mono por ia celo. La bruo certe malebligis konversacion kaj, verdire, grave difektis la vesperon. Mi konfesu ke mi estus preta kunlabori, se iu provus elpeli la entrudiĝintojn; sed la universitataj aŭtoritatoj faris nenion tian.

Jen ekzemplo de toleremo kiun tiutempe mi rigardis kiel troan. Tamen mi poste decidis ke en la tiamaj cirkonstancoj ĝi estis plej prudenta reago. Ĉar, anstataŭ fari el la manifestaciantoj martirojn, ĝi lasis ilin sin kondamni per propra ago.

Universitatoj, mi aldonu, troviĝas inter la plej fidelaj praktikantoj de politika konformeco. Kaj jen stranga paradokso. Tiuj samaj universitatoj subtenas en sia personaro multajn el la plej individuistaj pensistoj kaj verkistoj, ĉe kiuj konformiĝo estas anatema. Malgajigas min vidi kiel en la nuna tempo politika konformeco estas pli kaj pli trudata al ili.

Pri ĉiu temo ekzistas almenaŭ du vidpunktoj. Neniu posedas la tutan pravecon, negrave kion pretendas la zelotoj kaj la regemuloj. Ni do devas toleri diversecon kaj en pensoj kaj en agoj. Kaj la plej efika vojo al tolero estas tra kompreno. Ĝenerale, ju pli ni komprenas aliajn perspektivojn, des pli ni pretas lasi al ili lokon en

nia socio. Jen troviĝas, almenaŭ parte, la celo de la kreinto de Esperanto. Mi estas certa ke ni ĉiuj, legante en la tutmonda lingvo verkojn el aliaj landoj aŭ kulturoj, plilarĝigas nian ŝaton al la riĉeco de la homa mondo. Se nur tiel farus pli da homoj!

NI RICEVIS

ekzempleron de nova kasedo titolita *Kompil' vol.1* de Vinilkosmo. Ni serĉas kompetentan recenzonton rok - muzik - amantan por ĝi. Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti la redaktoron.

Odlo Bokserp

petas pardonon pro la relativa manko de komposteraroj en ĉi tiu numero. Li preparas festi sian naskiĝtagon.

Odlo naskiĝis je la 14a de oktobro, 639, en Beijing, Ĉinio. Li estis duono de ĝemela paro kies ~~gej~~gepatroj estis la unuaj fakdelegitoj de UEA pri preskliŝgravurado en tiu parto de la mondo.

Unu el la plej elstaraj verkoj de Odlo, antaŭ ol membriĝi en la redakcia stabo de *Esperanto sub la Suda* ni gratulas la feliĉajn gej~~ge~~patrojn.


MALCOLM WILLIAM ROSS

Malcolm Ross mortis en Manlio la 4an de majo, 1995.

Malcolm naskiĝis en Manlio, la 10an de junio 1911. Li fariĝis pedagogo kaj instruis en Glebe, Orange kaj Manildra. Dum la Dua Mondmilito li servis en 2/2 Australian Beach Signals, armea signalorganizaĵo. Post la milito li instruis en Manlio, Balgowlah, Mosman, Bathurst, Enmore, Leichardt, Maroubra, Suda Sidnejo kaj en la Korespondlernejo de Blackfriars. Li estis presbitero en la Presbiteriana Eklezio kaj poste kun sia edzino, Adelaide, ludis gravan rolon en la Unuiĝanta Eklezio, ekzemple en junulaj tendaroj.

Malcolm estis entuziasma Esperantisto kaj instruis multajn klasojn. Li partoprenis en la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Svislando en 1979 kaj vojaĝis en aliaj landoj. Li estis tre ŝatata partoprenanto en multaj kongresoj kaj aliaj eventoj en Aŭstralio. Preskaŭ ĝis sia morto li restis aktiva kaj tre amata membro de la Manlia Esperanto-Klubo kaj AEA.

Ralph Harry



Igorj Sitnikov

NUKLEA BOMBO—DENOVE

de Brian Fox

Antaŭ kvardek kvin jaroj, en la vespero de vendredo 11 aŭgusto 1950, geamikoj kaj mi marŝis laŭ la longo de la ĉefstrato de Aŭklando, Queen Street, kun afiŝoj kontraŭ la atoma bombo. Nur malgrandaj afiŝoj. Nenia kriado. La polico arestis nin. Post la formala aresto, du marsoldatoj atakis nin. La polico ne prenis la nomojn de tiuj du atakantoj sed prenis la nomojn de ni, la afiŝoportantoj. Kaj ni pasigis la nokton en la karcero.

Memoru ke tiu tempo estis la tagoj de Senatano Joseph McCarthy en Usono. Feliĉe la juĝistoj en Nov-Zelando ne estis tiaj kiaj en tiutempa Usono, kaj la juĝisto deklaris nin senkulpaj kaj ke ni ne "obstrukcis la policaron". Mi estas instruisto kaj post iom da tempo, malgraŭ la decido de la juĝisto, la Komisiono Pri Edukado alvokis min al sia oficejo por postuli ke mi demisiu de instruado ĉar mi ne estis taŭga persono por instrui geknabojn. Mi rifuzis. Ili insistis kaj mi persistis rifuzi. Ili diris ke mi baldaŭ ricevos leteron por maldungi min. Tiu letero neniam alvenis.

Post mia provtempa posteno mi ne ricevis daŭran postenon por instruado dum ses longaj jaroj. Mi rapidas ekspliki ke tio ne estis pro la rezultoj de miaj ekzamenoj; ili estis altkvalitaj. Sed mi ja mencias tiujn ses longajn jarojn ĉar ofte dum tiu tempo mi kredis ke mi estis stultulo. Se mi estus havinta la saĝecon fermi la buŝon kaj ne kontraŭi la nuklean bombon, mi havus postenon kiel instruisto, mi povus gajni sufiĉan monon por ke la edzino kaj la gefiloj povu manĝi.

Tamen, nun la tuto de Nov-Zelando estas sennuklea, kaj mi esperas ke tiu eta fajrero antaŭ kvardek kvin jaroj helpis por fari la landon sennuklea.

Kvankam mi mem poste malsupren tenis la kapon, mia edzino, Jackie Fox, aktive serĉis subskribojn por peticio kontraŭ la nuklea bombo. Tute laŭleĝa okupo. Sed stranga afero okazis post dek kvin jaroj. Studentoj ĉe la Universitato en Wellington faris ruzon kontraŭ la SIS (Secret Intelligence Service, Sekreta Inform-Servo). Iu telefonis al la polico kaj diris ke malica manifestacio okazas ekster la stabejo de la SIS. La polico tuj sendis policistojn por regi la situacion. Kaj la studentoj sekrete ĉasis la policon por eltrovi kie loĝas la SIS. Kompreneble neniu manifestacio okazis. Sed post kelkaj tagoj iuj breĉis la oficejon de la SIS kaj ŝtelis dosierojn, kiujn ili montris inter la studentoj de la Universitato en Wellington. Inter la dosieroj estis foto de Jackie Fox.

Antaŭ dek jaroj, en la vespero de merkredo 10 julio 1985, teroristaj agentoj de la sekreta milicio de Francio, la DGSE, eksplodigis bombon sur la ŝipo Rainbow Warrior de la porpaca organizaĵo, Greenpeace, en la haveno en Aŭklando, kaj mortigis unu el la maristoj. La detektivoj en Nov-Zelando faris bonegan juran esploron kaj kaptis du el la agentoj. Kvar aliaj jam eliris Nov-Zelandon kaj en tiu momento estis sur Aŭstralia tero. La Nov-Zelanda polico petis al Aŭstralio ke ili tenu tiujn kvar agentojn ĝis kiam la Nov-Zelanda polico kunportos la pruvojn kontraŭ

la agentoj. Sed pro iu kialo kiun neniu eksplikis la aŭtoritatoj en Aŭstralio ne tenis ilin kaj lasis ilin forveturi.

Nun Prezidento Chirac de Francio decidis ke Francio denove provos eksplodojn de nukleaj bomboj en Pacifiko. Neniu bezonas tiajn terurajn nukleajn bombojn. Mi esperas ke ĉiu legos aŭ relegos la Aŭstralian libron Sur la Bordo de Nevil Shute, kiun tradukis en Esperanton Ken Linton.

Komuna Esperanto-Kongreso

de Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj, 3-10 januaro 1996
Akoranga Tereno, Akoranga Drive, Northcote, Aŭklando

La 1996 komuna AEA-NZEA Kongreso de Esperanto okazos en la Akoranga Tereno de la Aŭklanda Instituto de Teknologio. La maoria vorto Akoranga signifas "Lernado". La parto de la tereno kiun ni uzos estas ĉe la aŭtovoja fino de Akoranga Drive. Ĝi havas agrablan perspektivon trans la Havenon Waitemata al la Centra Urbo.

La plej granda parto de la gastejo estas en unupersonaj ĉambroj kun lito, littukoj, kaj kovriloj; kaj kun bantukoj, vestŝranko, legotablo kaj spegulo. Pluraj ĉambroj estas ĉe ternivelo. Duŝejo, banejo, kaj necesejo estas laŭ la koridoro sur ĉiu etaĝo. Kaj ĉiu etaĝo havas vestiblon kun seĝoj, rimedon por tea aŭ kafa preparado, fridujon; kaj havas telefonon por lokaj vokoj kiuj estas senpagendaj. Longdistancajn telefonvokojn oni rajtas fari de la plej supra etaĝo per kart-telefonilo.

Se oni veturas norden trans la havenan ponton, Akoranga Drive estas la unua elirejo maldekstren ĉe la Trefo por Esmonde Road kiu estas la dua trefo post la ponto. Ĉe la supro de la deklivo post la aŭtovojo, nia parkloko estas tra malgranda enirejo dekstren tuj antaŭ Pordo Unu. Ĝiru dekstren laŭ la antaŭo de la loĝejoj, inter ĉi tiuj konstruaĵoj kaj la vojo.

Aŭstraliaj civitanoj bezonas pasporton, sed ne bezonas vizon, por eniri Nov-Zelandon.

Tarifo Por La 1996 AEA-NZEA Kongreso en Nov-Zelandaj Dolaroj:

Tuta kongreso, se registrita antaŭ 31 oktobro ..... NZ $460
Tuta kongreso, se registrita antaŭ 30 novembro ..... NZ $480
Tuta kongreso, se registrita antaŭ 31 decembro ..... NZ $500
Tiuj kostoj inkludas la bankedon sed ekskludas la ekskursojn.
Ĉiu registro devas havi NZ$100 antaŭpagon.
Parto de la kongreso: NZ$85 por ĉiu tago plus NZ$19 pli por la bankedo.
Dumtagaj vizitantoj: manĝoj laŭ kosto: Matenmanĝo $10, Tagmanĝo $8, Vespermanĝo $11, Manĝetoj $5 por ĉiu tago, Bankedo $30, plus kongresa kotizo de $10 por ĉiu tago aŭ parto de tago.

Loĝado por la ekstra nokto (9 januaro) vespermanĝo, lito kaj matenmanĝo $46
Ĵaŭdo 4 januaro: Duontaga ekskurso al Awataha Marae $15
Dimanĉo 7 januaro: Tuttaga ekskurso al Montaro Waitakere kaj Strando Piha $15
Merkredo 10 januaro: Postkongresa ekskurso al vulkana Insulo Rangitoto..... ..... $25

Jackie Fox
Kasisto, Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

CHINESE ESPERANTISTS REFUSED VISA FOR AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Letter from Kep Enderby, president of the Australian Esperanto Association, to The Honourable Nick Bolkus, Minister for Immigration, June 1, 1995:

Dear Nick,

I'm sorry to trouble you with a matter that probably seems trivial alongside of your other concerns.

It relates to my being President of the Australian Esperanto Association.

I have already discussed it with Brendan Ryan in your Parliamentary office, and on the 3rd May faxed what I hoped was the relevant information to him.

Brendan has been very helpful and I have done what he advised but I fear the problem remains.

The first aspect of the problem, which is the more urgent, arises in connection with the Australian Esperanto Association's annual Congress which is to happen in Southport Queensland between the 30th June and the 6th July this year.

This particular Congress in itself is relatively small. Following what has almost become a tradition, our organisers in Queensland invited a number of Chinese Esperantists to attend our Congress. It was done through the Chinese Esperanto League.

It has been done before with no problems. In 1988, for example, Brisbane hosted the 4th Pacific Esperanto Congress and a number of Chinese attended. As far as I know, there were no problems with visas. They all came and went home after the Congress.

This year however the Chinese have been refused visas. The Chinese say that when the visas were applied for, their invitations from Australia were taken from them and kept, and their passports stamped that their applications had been refused!

When I spoke with Brendan, he said that our Embassy had said that there was not a sufficient amount of information accompanying the applications for visas, for them to be considered properly. He also said that increasingly these days, some Chinese recipients of visas come to Australia and try improperly to stay on. This justified us in examining all applications strictly. There can be no quarrel with that and it seems that, in this case, the Embassy is not satisfied about bonafides.

I have attended quite a number of these Congresses in recent years. They have been held mostly but not always in "high standard of living countries". I have never heard of any participant not having gone home. To the best of my belief the Chinese Esperantists, in this case, are genuine. They will come and they will go home.

I passed on Brendan's advice to me to Ray Ross, our Secretary in Brisbane, and he had it faxed to China.

Ray has not been told by fax from the Chinese that our Embassy has again refused them visas.

For this Congress, there are only a few applicants involved, perhaps 5 or 6. Can you help?

A more worrying aspect of the situation is, as I think I mentioned to you at the Cultural Diversity Conference, in Sydney, that in 1997, Australia will be hosting a World Esperanto Congress.

No one knows exactly how many will attend that World Congress but on past experience, even given Australia's remoteness, perhaps 1500 will come from 60 to 70 different countries of the world.

What will happen if the Chinese, or any others from any other countries are similarly refused visas?

Some 230 attended from China at the last World Congress that was held in Korea last year. As far as I know they all went home.

Allowing for obvious differences, I am hoping for at least a hundred or more to come to Australia from China for our 1997 Congress.

As President of the Australian Association which will host the 1997 Congress, you can see why I am beginning to be concerned.

As I have already said, I feel that it has to be a language or communication problem.

Whatever it is, I hope you can help.

Some advice, some guidelines, some reassurances about the 1977 Congress, would be very welcome.

Kep

[Keppel Enderby
One-time Attorney General of Australia, and
retired Chief Justice of the NSW Supreme Court]

UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS IN TAMPERE, FINLAND, 1995

A lengthy report of the UK in Tampere, July-August this year, written by Max Wearing, has been received and will appear in the English Supplement to our September issue.

If you wish to know more about Esperanto, or to examine the possibility of learning Esperanto through a correspondence course, we suggest you contact:

John Moore, 7 Pelican Place, Emu Park Qld 4702.

FRIENDS OF 82nd UNIVERSALA KONGRESO 1997

Contributors to this fund lend their money on the understanding that it will be returned to them from the Australian component of any profits accruing after the event in proportion to their contribution and before any other donations are withdrawn.

Aim: To provide funds for the promotion of the Esperanto language in South Australia from July 1996. The LKK-SAES has sole access to this account and it can be used in whatever way it sees fit.

This fund will be open to accept contributions from July 1995 to July 1997. All monies received will be invested at the highest possible rate.

If you wish to contribute, please contact me:

Dianne Lukes

c/o Post office, Meringandan Qld 4353

To date: Money collected during 31st AEA Congress: $900.00
Money promised during the Congress: $3350.00

CHANGE OF STATUTE/STATUTO-ŜANĜO

During the General Meeting of the Australian Esperanto Association Inc., July 5, 1995, a decision was made to change the Statutes to the effect that the Administrative Year is to coincide with the Financial Year. Regulations require that the members vote on any change to the Statutes. We request *members* to use the ballot below.

Dum la Ĝenerala Kunveno de la Aŭstralia Esperanto-Asocio Inc. la 5an de julio 1995, estis decidite ŝanĝi la Statuton por konformigi la Administran Jaron kun la Financa Jaro. Reguloj postulas ke la membroj voĉdonu pri ia ŝanĝo al la Statuto. Ni petas *membrojn* uzi la ĉisuban balotilon.

BALLOT/BALOTILO

Bonvolu indiki vian subtenon de la proponita ŝango al la Statuto de AEA Inc./Please indicate your support for the proposed change to the Statute of AEA Inc.:

6. Administra Jaro. La Administra Jaro estas la Financa Jaro.

Jes Ne

Al/To:
Aŭstralia Esperanto Asocio Inc.
PO Box 313
Sunnybank Qld 4109

YOUTH GRANT FOR THE JANUARY ESPERANTO SUMMER SCHOOL

Are you Australian? Are you under 30? Are you a member of an Esperanto Association? If you answer yes to these questions, why not consider starting to learn or improving your knowledge of Esperanto by sending your name, address, and date of birth, together with a short essay of 250 words in English or Esperanto, giving your reasons for applying.

The grant is of $300 towards participation in the AEA's Esperanto Summer School in Adelaide, 1996.

Applications to: Secretary, Melbourne Esperanto Association, Inc., PO Box 2122 T, Melbourne Vic 3001. Final date for applications: October 2, 1995.

YOUR ESPERANTO BULLETIN

is a newsletter sent to enrolled students of the Correspondence Course Service of the Australian Esperanto Association. It appears every two months, is produced on a Macintosh computer and has, the visually appealing and professional appearance normally associated with Mac-produced publications. This newsletter is written almost entirely in English and contains the regular feature: "News from the World of Esperanto."

A significant part of the content of *Your Esperanto Bulletin* is derived from the editor's participation in the lively Internet newsgroup, "soc.culture.esperanto," an electronic discussion forum receiving nearly 200 postings per month from individuals in over 21 different countries. (WOW!)

As well as providing you with interesting reading, *Your Esperanto Bulletin* is an excellent hand-out to give to curious, uninformed, or mildly sceptical members of the public. (Don't give it to hostile or prejudiced deadheads, though—it's too good to waste!) In fact, it's written with such a public relations function in mind and it is suitable to be placed in schools, libraries and community centres, preferably with other samples of the excellent publicity material available from the AEA.

A year's subscription to this informative and attractive publication will cost you only a book of ten 45 cent stamps (or a $5.00 note, if you're feeling generous). What a bargain! Back issues from January 1994 can also be obtained and cost only 20 cents each (plus postage).

Order Your Esperanto Bulletin from:—

David Poulson, 6 Barlee Place,Edgewater WA 6027

LINGVA ANGULO

de Alan Towsey

En *ESK* N-ro 8 (marto-aprilo 1994) mi diskutis la tradukojn de la angla vorto "suggest". En la junia (1995) numero de *Monato* mi rimarkis dufoje la verbon **sugesti**, en du sencoj.

Sur la redakcia paĝo oni legas: "Iu pola leganto iam **sugestis**, ke certe rolos aliaj kriterioj ankaŭ." Tio sekvas la bazan signifon de la vorto, kaj povus esti tradukata per" "...put it to us that..."

En letero sur p. 7 tamen iu usonano skribis, aludante al filmo (pri kiu li jam diris: "Tiuj, kiujn interesas la temo de la artikolo de Z. B.-F. ... eble ankaŭ **ŝatus** [would like] spekti la internacian altvaloran filmon ..."): "Mi ĝin **sugestus** [= proponus] por spektado ankaŭ al politikistoj...". Tio sekvas la alian, nuntempe oftan, uzadon de la vorto, kiun mi diskutis en mia artikolo ĉi-supre citita.

Estas interese, ke Peter Benson, en sia nova *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (en kiu tamen, spite la pretendon "Comprehensive" [= ampleksa], mankas multaj ofte uzataj vortoj!), donas por "suggest" la jenajn tradukojn:

(propose idea, gen.) sugesti (tr); (hint) duondiri (tr), kvazaŭdiri (tr); (influence person under hypnosis etc.) sugestii (tr).

Li ne mencias **proponi**! Kiel mi skribis en mia artikolo, eĉ Butler en sia *Esperanto-English Dictionary* ŝajnas aprobi tiun uzadon (laŭ li, = **proponeti**).

Eble do estas tempo, ke, kiel **ŝati**, la *Akademio de Esperanto* publikigu definitivan difinon de ĉi tiu vorto, aŭ aprobante aŭ malaprobante la novan uzadon.[1]

Sed ne pensu, ke mi oponas tiajn ŝanĝojn de signifo—ni devas akcepti la fakton, ke la signifo de multaj vortoj ŝanĝiĝas en la daŭro de la tempo en ĉiuj vivantaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Sed gravas, ke en internacia lingvo, kia Esperanto, la signifo de ĉiu vorto estu tute klara, kaj ne dubasenca.

Alia interesaĵo el la sama numero de *Monato*: En letero de Nederlandano mi legis: "Mia patrino **lernis** min ekzorci malfeliĉon per fingrofrapeto kontraŭ la suban parto de la tablo-platajo." Tiu uzo de **lerni** estas facile klarigebla: en la nederlanda "leren" signifas kaj **lerni** kaj **instrui**.

Eĉ en la angla "learn" povas havi ambaŭ signifojn—tiu de **instrui** aperis unuafoje (laŭ la *Oxford English Dictionary*) en la 13a jarcento, sed nun estas dialekta aŭ vulgara. Mi memoras el mia juneco Anglojn, kiuj punis siajn infanoj kaj samtempe diris: "That'll learn ya!" (kelkfoje prononcata "larn"). (Komparu la nederlandan "Wacht, ik zal je leren!") Sed tion mi nun ne aŭdis de multaj

[1] La Akademio de Esperanto malofte dum la pasinteco difinis oficialajn vortojn, tiel ke ilia signifo en vortaroj ofte estas almenaŭ parte laŭ la bontrovo de la vortaristoj. Por la lastaj privortaj decidoj la Akademio ja komencis doni difinojn, kaj espereblas ke ĝi plu konsideros tiun tre gravan parton de la Esperanta lingvouzo.—Red.

jaroj.

Nia estimata redaktoro sendis al mi la jenan frazon el *La Lanterno Azia*: "Aperigeblas senpage novaĵoj pri E-movado".

Unuavide tio ŝajnas esti tute en ordo—ĝis oni analizas ĝin, ĉi tiel: "Eblas aperigi—novaĵojn..."! La koncerna vortaranĝo estas ne nur mallerta, sed ankaŭ konfuzas la subjekton kun la objekto.

D-ro Broadribb skribis pri tio:

> Pri **ebl**: Mi supozas ke la kaŭzo de la eraro estas la penso: "ebl+ = pov+ kaj devas esti uzata nur kun transitiva verbo. *Haveblas = povas esti havata*, do *aperigeblas = povas esti aperigata*." Fone estas la tre kutima erara instruo en lernolibroj ke **ig** = transitivigilo por netransitivaj verboj. Tio estas erara, ĉar ĝi tro simpligas la aferon. Pli ĝuste, **ig** = **kaŭz**. *Mi lernigas vin = Mi kaŭzas ke vi lernu. Mi lernigas la lingvon = Mi kaŭzas ke la lingvo estu lernata = Mi instruas la lingvon*, kaj, kiel vi atentigis, la subjekto devas ne konfuziĝi kun la objekto.

Laŭ *PIV*, **ebl** signifas,

> ke io povas esti farata (= taŭga por esti -ata)." *PIV* rimarkigas, ke "La pasiva senco de *ebl* estas tiel forta, ke ĝi iafoje atribuas tiun sencon eĉ al verboj netransitivaj: *...irebla vojo, nerevenebla vojo* [= road of no return] ...", sed komentas: "Temas cetere nur pri verboj, kiujn povas sekvi *n*-komplemento (*iri vojon* ...; aliokaze, oni devas transitivigi ilin per *ig*: *nebruligebla materialo*, ktp.

La baza signifo de **ig** ja estas "cause, make, render", plej ofte kun adjektivo aŭ verbigo, do:

purigi—to clean. ebligi—to make possible, enable (in some contexts).

(Kun adjektivoj, oni povas ankaŭ uzi **fari**:

fari ion tro facila[z]. Per tiu donaco li faris ebla mian vojaĝon.)

Li starigis la eskalon kontraŭ la muron (= igis la eskalon stari ...)

La laboristo ĉesigis sian laboron[z] (= igis la laboron ĉesi).

Ŝi ne povis haltigi la ĉevalon.

mortigi—to kill (= make die).

Kun transitivaj verboj, ĝi signifas kaŭzi, ke iu (io) faru ion." Do:

sciigi amikon pri novaĵo[z] (= inform, cause him to know about).

trinkigi ĉevalon (get a horse to drink, to water a horse),

Mi manĝigos vin (= I'll feed you, cause you to eat).

Vi vane penas kredigi min, ke tio estas vero[z]. (En tiaj okazoj oni ofte povas uzi **ig** memstare: Mi igis lin skribi la leteron (I made him/got him to write the letter).)

Kun transitivaj verboj ĝi povas havi ankaŭ pasivan sencon.

La reĝo konstruigis belan palacon—The king had a beautiful palace built.

Mi devas tondigi al mi la harojn—I must get my hair cut.

Tia uzado troviĝas ankaŭ en pluraj eŭropaj lingvoj, kiaj la franca kaj germana:

faire réparer une voiture/ein Auto reparieren lassen = riparigi aŭtomobilon.

Subkomprenigata estas la ideo, ke oni igas aŭ kaŭzas iun fari ion por oni.

La baza senco de **iĝ** estas "become, get". Ĝi esprimas ŝanĝon de stato:

edz(in)iĝi—to get married (become a husband/wife).

Lia konduto nun pliboniĝis—His behaviour has now improved/become better.

enlitiĝi—to get into bed, go to bed.

sidiĝi—to sit down. stariĝi—to stand up. kuniĝi—to get together.

mortiĝi[z]—to be or get killed.

Kelkfoje la komenco de la ŝanĝo de stato povas esti esprimata per ek, ekzemple:

eksidi—to sit down. ekstari—to stand up.

bruli (netransitiva) = to burn. La fajro arde brulis. La ligno ekbrulis—The wood caught fire/began to burn. Li ekbruligis la domon—He set fire to the house.

Ĝi povas ankaŭ ŝanĝi transitivan verbon en netransitivan:

Li rulis la pilkon—He rolled the ball. La pilko ruliĝis—The ball rolled.

komenci lecionon—la leciono komenciĝis.

En tia okazo ĝi ofte havas pasivan sencon:

La leciono komenciĝis—The lesson was begun.

La laboro komenciĝis—The work was begun.

Kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite[z].

Li facile ekscitiĝas—He easily gets excited.

naskiĝi—to be born. La taso rompiĝis—The cup broke, got broken.

La diferenco inter la iĝ-formo kaj la pasivo estas subtila. La pasiva formo ĉiam subkomprenigas (= implies) iun, kiu faras la agon; laŭ *PIV:*

> *La pordo estas fermata* (de ies mano); sed ĉe la iĝ-verboj la subjekto kaj la aganto estas identaj ...: *La pordo fermiĝas* (per si mem). Kp. *Ĉu la kandelo estis estingita, aŭ ĝi estingiĝis mem?*[z]

Alia ekzemplo povus esti: *La princo fariĝis reĝo = The prince became / was made king.*

*Do, neniam uzu **de** por la aganto post iĝ-verbo! Se vi mencias la aganton, uzu la normalan pasivon: *Li estis vundita de la soldato,* ne **Li vundiĝis de la soldato.* Tamen, *Li vundiĝis per lanco* estas tute ĝusta, ĉar ni ne scias, kiu ĵetis la lancon. ❑

82-A UK KONGRES-INSIGNO ADELAJDO 1997



Verde presita sur fiava fono. 15 glumarkoj sur A4-folio: $2.00+50¢ poŝtsendo; 10 folioj $15.00+95¢ poŝtsendo. Mendu de la AEA-Libroservo.

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA:
Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428
Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

/ Mohamed Reza TASKATORI, P.O. Box 11365-5715, Tehran, Irano. 31-jara edziĝulo. Universitata studento. Kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn ktp. Interesiĝas pri Esperantistoj en multaj landoj.

/ Reinaldo FERNANDEZ, San Francisco # 7, 10 Octubre y Alejandor Ramírez Ceur Zona 3, Central Habana, Kubo. 49-jara. Fakdelegito de UEA. Parolas kvin lingvojn. Interesiĝas pri Esperantistoj en multaj landoj. Deziras instrui Esperanton en nia aŭ alia lando.

/ Zuzana VISLAYOVÁ, 04405 Janik 5, Slovakio. 28-jara instruistino.

/ Silvia SPIŠÁKOVÁ, 04402 Turnianske, Podheadis 265, Slovakio. Fratino de Zuzana.

/ Eva González MARTÍN, La Magdalena No. 26-10, 33400 Aviles (Asturias), Hispanio. Lernantino.

/ Luís González DÍAZ, 6 Sabino Alvárez Gendín 9B-5"-A, 33400 Aviles (Asturias), Hispanio. Lernanto.

/ Jerzy WROBLEWSKI, 21-305 Suchowola, Pollando. Sperta Esperantisto, korespondas kun multaj landoj. Ĉefe deziras interŝanĝi bildkartojn, sed kolektas multe.

/ Marek FILIŐKO, NA Dražce 418, 530 03 Pardubice, Ĉeĥio. 24-jara. Lernas de 8 monatoj. Aktiva sportemulo. Legas bonajn librojn (J.R.R. Tolkien, M. Waltari), ŝatas muzikon, kolektas poŝtmarkojn.

/ Huai YU, P.O. Box 152, Nikolaev, 327001 Ukrajno. 30-jara, vicdirektoro de la Ĉinio-Ukraina Komuna Kompanio, membro de UEA. Produktas vestojn, havas restoracion kaj magazenon, deziras establi filion en Brisbano aŭ Sidnejo, ankaŭ interesiĝas pri geedziĝa servo.

/ Juan Manuel ALONSO DE ARCOS, Alameda de Capuchinos 8.-5B, 29014 Málaga, Hispanio. Deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn.

/ Nazé CHRISTIAN, Rue de Flénu Nº 12, B-7390 Quaregnon, Belgio. Deziras interŝanĝi uzitajn telefonkartojn kontraŭ poŝtmarkoj.

(daŭrigo sur paĝo 22)

Kion ni scias unu pri la alia? Kion ni scios se ni ekiros al librobreto en regiona biblioteko? Kiel vidas sin valono, mordovo, kalmuko, ruso, germano? Ĉu tiu bildo estas identa al nia koncepto pri la alia? Ni komencas programon por interkonigi homojn ĉiajn. La formo de la laboro estos artikoloj, leteroj, intervjuoj, tradukoj, konferencoj, ekspozicioj, filmoj, libroj, specialaj periodaĵoj, k.a. Oni planas ke la materialoj publikiĝos en naciaj gazetoj en naciaj lingvoj kaj en esperantaj gazetoj Esperante. Esperanton oni uzas kiel lingvan perilon. Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn al:

Igorj Sitnikov
390039 Rjazan, ul. Internacionalnaja

19-1-59, Rusio.
Kun indiko "por *Ni Estu Konatoj*", kio signifas vian permeson publikigi la materialon.

Igorj Sitnikov kaj
la rjazana Esperanta Klubo
"Vagantes"

LA ESPERANTA KLUBO "VAGANTES"

La Esperanto-klubo "Vagantes" en Rjazan estas tre juna. Ĝi naskiĝis nur 10 aprilo 1994, kaj havas kvar klubanojn. Nia klubo estas ano de la asocio "Veresk" kiu aperis en Rjazan en 1992 cele helpi internacian kunlaboron en la sferoj de kulturo kaj edukado. La asocio unuigas kelke da "naciaj" kluboj, en kiuj homoj studas naciajn lingvojn kaj naciajn kulturojn de la mondo. Ĉiuj kluboj baziĝas ĉe la Rjazana regiona biblioteko en la sekcio de fremdlingva literaturo.

Ni nur komencas nian agadon, nur havas kelke da ideoj:

- internacia programo *Ni Estu Konatoj*, intencas helpe de Esperanto interŝanĝi per artekspozicioj, artikoloj, kaj tradukaĵoj pri naciaj kulturoj
- kreado de speciala periodaĵo por tutmonda biblioteko de nuntempa regiona literaturo en Esperanto
- uzado de la esperantlingva periodaĵo por tutmonda biblioteko de la nutempa regiona literaturo, kiel lingva peranto por la kreado de samaj nacilingvaj periodaĵoj en la grandaj kaj malgrandaj lingvoj de la mondo.

Ni tutkore invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la realigo de tiuj ĉi projektoj. La adreso:
390000 Rjazan
ul. Astrakhanskaja 52,
Biblioteka im. Gorkogo,
otdel literatury na inostrannekh jazykakh,
asocio "Veresk" al Sitnikov Igor.
Rusio ❑

NOVE APERIS

Eposoj el Antikva Ugarito, tradukita de Donald Broadribb. 46 paĝoj (A4-dimensiaj). Bookleaf Publishing, 1995.

Tri eposaj poemoj, "Baal kaj Anat", "Krt", kaj "Aqht", el antikva mitologio, en facile legebla traduko.

Havebla ĉe la Libroservo de AEA. Prezo: $10.00.



desegnis Igorj Sitnikov

SKRIBAS LA LEGANTOJ

De Alan Towsey

Pri la peto de Martin Purdy (*ESK* julio-aŭgusto 1995):

Mi devas averti lin, ke la versaĵo citita de li ne estas originala, sed ŝtelita de Jaberwocki el verko de alia pola poeto, la fama Ludwig Karolski[1] nome ties *Aliflanke de la Spegulo*.

Mi gratulas Martin pri lia lerta traduko—sed estas domaĝe, ke ĝi ne rimiĝis kiel la originalo.

[1] Luduicus Carolusci, 114-132, fama Romanpola poeto, ekzekutita pro sia poemo "Brilego", opiniata blasfema kontraŭ Mitrao.—Red.

De Ralph Harry:

Tre interesis min la versaĵo trovita de Martin Purdy (*ESK* 16 p.14).

Estas kelkaj klasikaj versioj en la angla lingvo de tiu poemo de Jaberwocki, ekzemple tiu de Charles Dodgson:

'Twas brillig, and the slithy toves
  Did gyre and gimble in the wabe;
All mimsy were the borogoves,
  And the mome raths outgrabe.
Beware the Jabberwock, my son!
  The jaws that bite, the claws that catch!
Beware the Jubjub bird, and shun
  The frumious Bandersnatch!
(Strofoj 1-2)

And, as in uffish thought he stood,
  The Jabberwock, with eyes of flame
Came whiffling through the tulgey wood.
And burbled as it came!
One, two! One, two! and through and through
  The vorpal blade went snicker-snack!
He left it dead, and with its head
  He went galumphing back.
And hast thou slain the Jabberwock?
  Come to my arms, my beamish boy!
O frabjous day! Callooh! Callay!"
  He chortled in his joy.
(Strofoj 4-6)

Alia angla versio troviĝas en mia libro *The Diplomat who Laughed* (Hutchinson, 1983). Mi notis ke la starigo de Unuiĝintaj Nacioj en San Francisko estis okazo kiam ekfloris multkultura humuro. La nomoj de la "fondintaj patroj", inkluzive tiun de D-ro H.H. Evatt de Aŭstralio, kaj la malreala atmosfero de kelkaj intertraktadoj estis respegulitaj en ĉi tiu parodio de la poemo. La aŭtoro probable estis F.L. McDougall de Aŭstralio, nobla internacia oficisto:

United Nations Jabberwocky

'Twas greenwich, and the gromyko
Did byrnes and trygve in the lie;
All evatt was the vanderberg,
and the thomas conally.
"Beware the Molotov, my son!
Avoid its clauses if you can!
Beware the yalta bird, and shun
The red azerbaijan!"
He took his trieste sword in hand:
Long time the mukden foe he sought—
So rested he by the nuclear tree,
And fissioned there in thought.
And, as in fulton thought he stood,
The Molotov, with ears aflame,
Came brettoning through the plenary wood,
And vetoed as it came!
Offside! No score! And more and more
His iran blade went snicker-snack!
He cleared his throat, and sent a noteRequesting an answer back.
"And hast thou dunn the Molotov?

Come to my arms, my bullitt boy!
Oh atherton! Oh culbertston!"
He murphied in his joy.

Mi jam preparis esperantan version de mia libro, sed preskaŭ rezignis pri traduko de la Jabberwocky. Kuraĝigite de Martin Purdy, mi hodiaŭ faris la jenan provon. Eble Martin aŭ alia leganto helpos min ĝin plibonigi.

La Ĵargonaĉo de Unuiĝintaj Nacioj

'Stis greenwich kaj la gromyko
Ja byrnes kaj trigvis kiel li.
Tre evatt estis vandenberg
Kaj tomaso connally.
"Atentu Molotovon, fil',
Evitu lian voston kokan!
Atentu la birdon yaltan, kaj
Azerbaĵĵanon mokan!"
Li prenis la triestan glavon,
Serĉis mukdenon intense
Restadis ĉe nuklea arbo,
Kaj tie fendiĝis mense.
Kaj dum li fultonpense staris
La Molotov, bruliĝorele,
Brettonis tra arbaro plena
Kaj vetois tre malhele.
Eksterlude! Sen poentoj!
Kling' iranta en la mondon.
Li tusis kaj postsendis noton
Petante tujtujrespondon.
"Kaj ĉu v' mortigis Ĵargonaĉon?
Al miaj brakoj, bela knab'!
Ho, atherton! Ho, culbertson!"
Li murphyis en panĝab'.

[Teksto idiomete korektita laŭ la ĵus trovitaj originalaj ŝtontabuloj—Red.]

En la Septembra Numero

"Mia vizitinto", rakonto de Donald Broadribb
Report on the UK in Tampere, Finland, by Max Wearing
Pri aŭstralianoj el Rusio, de Igorj Sitnikov
Kontribuoj sekretaj de Odlo Bokserp

Deziras Korespondi

(daŭrigo el paĝo 19)

/ Sojukny EVDEKIMOVA, pr.20-1-81, Moscow 111396 Rusio 28. 28-jara fraŭlino, interesiĝas pri libroj, vojaĝoj, bestoj. Ankaŭ lernas la Anglan lingvon. Deziras Anglalingvan skribamikon.

LA VERDA URBO

/ Adresoj en Zelenograd (regiono de Moskvo) nomata "Verda Urbo": Viktor Salatov Nikolaevič organizis la grupon. 30-jara inĝeniero, protekisto, konstruis la "Verdan Urbon"". Deziras korespondanton kun la sama profesio. Adreso: Rusio, 103575 Moscow Zelenograd korp 905. kv.35, "Verda Urbo", Viktor Salatov NIKOLAEVIČ.

/ Galina Magdalina NOVIKOVA, RUSIO, 103482 Moscow Zelenograd, Korp.905 kv.35, "Verda Urbo".

Aliaj Adresoj

/ Roman BURANOV, RUSIO, 103482 Moscow Zelenograd, 339-24.

/ Jakovlev MAKSIM, 14-jara. RUSIO, 103498 Moscow Zelenograd, 403-53.

/ Narojkaja NATX, 17-jara. RUSIO, 103575 Moscow Zelenograd, 1004-10.

/ Olja KORCAGINA, 16-jara. RUSIO, 103498 Moscow Zelenograd,433-46.

/ Kocetkova TOMJA, 13-jara. RUSIO, 103681 Moscow Zelenograd, d4kv54.

/ Marina AMICHANOVA, 15-jara. RUSIO, 103482 Moscow Zelenograd, 360-398.

/ Katja TAKAIVA, 16-jara. RUSIO, 103498 Moscow Zelenograd, K-498-31.

/ Marija PROLOVA, RUSIO, 103408 Moscow Zelenograd, 442-118. 16-jara studentino, kolektas bildkartojn, kalendaretojn, poŝtmarkojn, interesiĝas pri muziko, arto, bestoj. ❑

THE MYSTICAL CHORUS

recenzas Vera Payne

The Mystical Chorus by Donald Broadribb, with contributions by Marilyn Holly and Norma Lyons. Sidnejo: Millennium Books, 1995. 277p., broŝurita. $20.00.

Jen trezortrovo (en la angla lingvo) samtempe erudicia kaj tiom interesa, ke preskaŭ distra. Oni povus subtitoli ĝin: Ĉio kion vi iam volis scii pri kompara religio sed estis tro maldiligenta, okupata aŭ nekapabla, por mem esploradi. Aŭ eble, Faktoj kaj Fantazioj Religiaj.

Legantoj de *ESK* konas Donald Broadribb kiel elstaran redaktoron de eta sed ne bagatela gazeto, kiel verkiston, kiel Akademianon, kiel instruiston kaj kiel somerkursaran aŭkciiston senkomparan. Aldonu la jenajn. Post sukceso kiel Magistro de Teologio en Nov-Jorko, li diplomiĝis Doktoro de Filozofio en la Universitato de Melburno kie li instruis pri religio dum dek jaroj. Post tio li praktikis kiel Analiza Psikologo, jam gajninte diplomon pri Analiza Psikologio en la C G Jung Instituto en Zuriko, Svislando.

Dum la multaj jaroj en kiuj li kunsentis la agoniojn de suferantaj pacientoj, li konsciis, ke iu "religia sinteno" flanke de la suferanto ege helpis liberigi ŝ/lin de la suferado. Sed tia religia sinteno ne devas esti ia ortodoksa afero, sed ia eltrovo pri la propra niĉo en la daŭra evoluado pli ol kvinbilionjara de vivestaĵoj niaplanedaj. Ia nuligo al la sento de fremdiĝo disde la fizika mondo kiu estas parto de ni, kaj kiun ni malagnoskas kaj pli kaj pli rapide detruas.

Ia solvo al la fremdiĝo disde aliaj homoj. "Unu suferanta persono instruos al vi pli ol miliono da libroj. Des pli bone se vi mem estas la suferanto..."

La esploro kaj verkado de ĉi tiu libro tempopostulis ses jarojn. La rezulto estas plenpotenca kontraŭvenenaĵo al la kutimaj dogmoj, kvankam la aŭtoro mem tre zorgas neniam sin esprimi diktatore, sed ofertas kiom eble plej da faktoj kaj klarigoj por via digesto. Mi diris "la aŭtoro" sed fakte estas tri aŭtoroj, kaj tio donas plaĉan varion de stiloj en ĉi tiu ampleksa verko. Donald ĉefe prezentas analizon pri Budhismo, Kristanismo kaj Mistikismo, ne nur vidpunkte de psikologo sed ankaŭ de enketema homo kiu jam pilgrimis (almenaŭ en ĉi tiu vivo!) dum pli ol 62 jaroj.

Li ne timas atentigi: "El la ĉefaj religioj, tri elstaras kiel postulantoj de tuta kaj ekskluziva lojaleco kaj havas sistemojn per kiuj anoj povas esti eksigitaj el la religio: Judaismo, Islamo, Kristanismo. Ĉi tiu ekskluzivismo laŭiras la instruon de ĉiu el ili, ke sole *ĝi* havas la absolutan kaj tutan dian veron kaj dio-donitajn Male, la Budho instruis: kredu nenion sen zorga antaŭpensado—kaj eĉ tiam vi povos erari. Fakte vi devas erari, ĉar la absoluta, fina realaĵo ne koneblas intelekte. Se vi povas priskribi ian profundan veron, ĝi ne estas la vero. La vero estas nedirebla. (Ĉu eblas, kiam la tuta cerbo de la homo uzeblas, ke tiu vero ne plu restos nekonebla?) Oni ne povas pentri ĉiujn spertojn en vortoj, eĉ ne en pensoj aŭ en konceptoj. Ankoraŭ ne ekzis-

tas en ĉiu lingvo vortoj havantaj sian propran kunvorton en alia lingvo. Des malpli vortoj por ne-ĉiutagaj spertoj kaj konceptoj en la diversaj mondvastaj kulturoj. (Kaj universovastaj??) Parenteze, legantoj de *La Respubliko* estus rimarkintaj, ke la Grekoj jam konis Budhismon dum la tempo de Platono.

Ho ve, kaj sklavismo kaj la subpremo de virinoj rolis nepridemande en ambaŭ religioj. (Kiel ankaŭ ĉe Islamo, kaj ĉe Platono.) La vircentra Kristanismo enkondukis la marian principon, kvankam ne en la protestantan filion. Vi eltrovos kial kaj kial ne. Ege ĝenas min la **Li, Lia, Lin, Liaj, Liajn** kiuj troviĝas en ĉiuj el la religioj. Ĝuste tiom stultaj estis la honoro/adoro de diinoj pasintece. En Islamo, Muhammad instruis, ke la virino estas la ĝemela duono de la viro, kaj lia egalo ĉiurilate, sed la fundamentistoj tion neniam fanfaronas.

Jung kaj Freud rimarkis, ke malgraŭ ĉiu atestaĵo al la malo, io en ni neas la koncepton de nia fino. Kie naskiĝis la koncepto de la senmorta animo? Vi eltrovos. La kristana mondo ankoraŭ ne decidis, ĉu oni tuj flugas al sia Kreinto post la propra morto aŭ ĉu oni devos ie atendi ĝis la fina juĝo de ĉiuj. (Iukaze, oni ne devos multe atendi!)

Estas multo en Kristanismo kion instruis la Budho. Gautama (kiu fariĝis la Budho, la "Vekiĝinto") kaj Jesuo (kiu fariĝis la Kristo) ambaŭ instruis respekton, malavidon, moralecon. Nek unu nek la alia sin ĝenis pri doktrino. Tio venis poste. Laŭ Budhismo, la vivo de ĉiu sentema estaĵo estas kaj porĉiame restos, neperfekta. Vivi signifas suferi. Ĝojon ĉiam sekvas malĝojo. Ne ekzistas "Dio" por forpeni la suferojn. Sed Gaŭtama ankaŭ konsciis, ke fido je "racio" estas tiom iluzia kiom fido je "religio". Kvankam frue en sia vivo Jung ne konis la budhistajn konceptojn, ankaŭ li konkludis, ke la intelekto sola ne povas malkaŝi la plej profundajn verojn. Budhismo emfazas la propran respondecon. Via ago por bono aŭ malbono kaŭzas aŭ bonon aŭ malbonon. Sed ne atendas vin ia puno en ia posta vivo. Aŭ, ĉu ne? La Budhistoj kredas je reenkarniĝo, kaj viaj agoj determinas kia estos via venonta vivo. Hmm. Interesas min, kiom evidenta ĉi tiu fakto (avidu nun, pagu poste) estas koncerne la tutan homaron se ne la individuon. Ĉu ni priridu la koncepton de individua reenkarniĝo (pri kiu kredas ankaŭ la Hinduoj)? Nu, oni ne povas nei, ke neniu el ni naskiĝas tute "nova", kun tute neŭtrala vivotabulo. Nia memo dependas de nia kulturo, lingvo, gepatroj, prapatroj, t.e. de la pasinteco.

La ĉapitro pri mistikismo bonege kunplektas la rilaton inter la religia, la psikologia kaj la fizika memoj. Ke mistikulojn oni plejofte persekutis, baziĝis sur la tendenco de mistikuloj instigi politikajn kaj sociajn reformojn. La ilustraj anekdotoj, kiel tra la tuta libro, ege plaĉas. Jung kaj mi atingis la saman konkludon pri la origino de la vizioj de Sankta Paŭlo. Ĉu ankaŭ vi samopinios? Kompreneble, la mistikaj spertoj dependas de la kultura kredsistemo flanke de la spertinto. Sed la Budho instruis, "Se en via meditado vi vidas la Budhon, mortigu lin". Ĉar li bone sciis, ke la vizioj viditaj dum meditado aŭ dum fasto aŭ pro ĥemiaĵoj ne fidindas. Kaj, imagu, se mistikulo alfrontus vin: estas tre malfacile distingi inter mis-

tikulo kaj frenezulo!

Ĉu la Dio kreis la homon laŭ sia propra figuraĵo, aŭ ĉu la homo kreis la Dion laŭ la sia? Donald fosas en la historio de Kristanismo tre kontentige. Budhismo havas sen-Dio-fundamenton, kiun orientanoj akceptas senĝene, kvankam nur manpleno da okcidentanoj povas tiel koncepti. Kial? Legu p82. Ĝis sia morto, Jesuo restis Judo, kvankam li evoluigis la religisistemon. Gaŭtama, male, malakceptis sian hinduan fonton kaj komencis tute novan filozofisistemon. Strebu fari bonon, eviti malbonon, kaj kiel eble plej purigu la menson. Jen la tuto. Ne tiom malsimila ol la instruo de Jesuo pli ol 500 jarojn poste. Bedaŭrinde, vortoj kiaj Dio, Jesuo, Budho ofte kondukas al la malo de la signifoj celitaj.

Kia estas por vi la "Dio"? Ĉu samtempe ia amoplena patro kaj venĝema ordonisto? Ĉu por vi la Dio ne estas estaĵo, eĉ ne spirita estaĵo, sed ia **proceso**? Tiu lasta estas la budhista konkludo. Kia ajn via kaj mia kredo aŭ nekredo, ni memoru, ke tra la tuta historio tio kion oni iam proklamis nerifutebla vero (kaj ne nur temante pri religio) poste montriĝis malvera. Ni konkludu zorge, ĉar ni neniam havas nek havos ĉiujn el la faktoj pri la koncerna temo.

La indiĝenoj de la mondo konservas verojn kiujn ni, pli sofistaj uloj, jam perdis. Vere animtuŝa priskribo de eta infano resaniĝinta pere de meditado dum kiu ŝi unuiĝis kun la naturo, kondukas al ĉapitro pri la religio de la amerikanaj Indianoj. La verkistino, D-ro Marilyn Holly, ne malpli posedas kaj ampleksan scion kaj scintilan verkokapablon ol ŝia frato, D-ro Donald Broadribb.

Marilyn enkondukas nin al pensosistemo plurfacete multe pli nobla ol la nia, kun emfazo je harmonio kaj reciproko inter la homoj, la bestoj, la senanimaj terestaĵoj kaj la nekonataj (nekoneblaj?) spiritestaĵoj. Mi ofte legis pri Wakan Tanka, sed neniam tiom klare komprenis la signifon antaŭe. Kvankam la blankuloj tradukis la vorton kiel "La Dio", fakte en tradicia Sioux-a penso, WT estas **proceso** ne estaĵo. La metafiziko de la indiĝenaj nord-Amerikanoj koncentriĝis je honoro al la rikoltaĵoj de la tero. Oni prenis laŭbezone, neniam laŭ avido. La okcidentan pensmanieron trakuras dualismo (bono/malbono, vivo/morto, ktp) kaj ankaŭ "progresiva" tempovidpunkto—oni rikoltas dum la vivo pli kaj pli ĝis oni riĉiĝas—kontraŭe al la "cikla" vivmaniero de la indiĝeno, kiu atendas la alvenon kaj forpason de la tago, la nokto, la sezonoj, la lunoŝveliĝo.

La "racian" pensomanieron de John Locke, la "Tempo estas Mono"-filozofion de Benjamin Franklin, la dian Providencon de la Puritanoj kiuj mortigis la indiĝenojn kaj rekte kaj per siaj malsanoj, kaj multe pli ŝi interplektas en fascinan historion.

Ankaŭ ŝi estis studento de C G Jung kiu mem tre interesiĝis pri kaj ege respektis la indianajn kulturon kaj spiritualismon. Tiuj indiĝenoj jam de longe bone komprenis, ke ni ĉiuj havas nian "malhelan" flankon. Sed ili ne supremis ĝin. Male, ili kredis ke oni devas agnoski ĝin, konfesi laŭte la malbonajn sentojn rilate al iu ulo kaj simbole elagi la malbonon por ke restu nek subpremita veneno nek daŭra kulposento. Kaj ili ankoraŭ agnoskas la gravecon de la sonĝoj. Marilyn klarigas, ke la Iroquois-a kulturo posedis altajn kapablojn, aŭ egalajn aŭ pli evoluintajn

ol tiuj de la Eŭropanoj, koncerne la kuracon de kaj fizikaj kaj emociaj malsanoj. Ankaŭ solidan ekonomion kaj viglan komercon, fortan nacian defendsistemon, registaron bazitan sur la konsento de la regatoj antaŭ ol havis tion la okcidentaj landoj, bonegajn aranĝojn por socia sekureco kaj por helpo al ĉiuj homoj, kaj alte evoluintan kaj efikan "ligon de nacioj" pli impresan ol io ajn ĝis nun trovebla inter ni!

Perturboj en la vivo ĉiam nepros, kaj nenia spirita orientiĝo povas tion forturni, sed Marilyn Holly omaĝas al la indiana vojo de la spirito, kiu ankaŭ pligrandigis ŝian forton. Trafos vin multaj paraleloj inter la kredo kaj praktiko de la nord-amerikaj indiĝenoj kaj tiuj de la aŭstraliaj.

Norma Lyons (eks-S-ino Broadribb) tre lerte verkis ĉapitron titolitan "La Sankta Lando", pri la monistika aŭstralia aborigena religio, en kiu la animistikaj spiritoj unuiĝas kun la materiala mondo kiun ili vivigas. Malgraŭ la grandegaj distancoj inter tradiciaj triboj, la bazaj unuformaj konceptoj pri **la Sonĝado** restas la samaj. En tiu **Sonĝado** iluminiĝas la ligo inter la lando kaj la popolo. Ankaŭ en la aborigena kredo ekzistas egaleco inter ĉiu estaĵo ĉu viva ĉu senviva, t.e. ĉu homo, planto, besto, roko. La triba religio fariĝis la rimedo por direkti la naturan kaj socian mediojn. Sistemo de **totemismo** ebligis la ligon de individuo kun eterna viv-esenco de la lando. Pro tio, ke Prapatraj Estaĵoj enloĝas en ĝi animistike, la tuta lando estas sankta. La Aborigeno ne posedas la landon. Ĝi posedas lin. "Mia lando konas min." La religiaj kredoj kaj ritoj de popolo loĝanta en iu landparto kvazaŭas la proprietakton. Indas ripeti, ke la homo estis parto de sia mondo, ne mastro de ĝi. La kulturo restis senŝanĝa dum pli ol 40 000 jaroj ĝuste pro la perfekta tuteco de la homa adapto al la medio.

Ankaŭ Norma ne hezitas forte riproĉi pro la detruo de la homoj, lando, religio. Avido kaj maldegna sinteno al nigra haŭto rezultis en kaptaĉo de la lando kaj difektego de ĝi, altrudo de "Kristanismo" (Kristo plorus), kaj alŝovo de la indiĝenoj en la plej malaltan tavolon de la socio. La sankta rilato inter la lando kaj popolo, kaj la psikologia unueco kiu rezultis, estis atencita. Ne plu eblis sankta rilato kun la **reala** mondo. En ĉi tiu rilato inter homo kaj medio ŝi vidas paralelon kun Budhismo, Taoismo, kaj la kredo de mistikuloj kia Sankta Francisko. (Mi aldonu, ankaŭ kun Jesuo: Fariĝu kiel infano, t.e. ne sofistu por propra gajno.) Ŝi ligas tiun sintenon kun la avertoj de Jung pri mensa sano. Ĉar ŝi estas optimisto, ŝi diskutas la "provizoran" disiĝon de la homaro disde ties unuiĝo/unueco kun la medio. Kvankam unuiĝo ĉiam estis la konscia celo de la mondreligioj, ironie la religioj mem malunuigas. La religio de indiĝenoj ne estas "primitiva" sed "holistika" (tutisma), en kiu la homo ne estas la centra apogpunkto de la tero.

Norma ne timas agnoski la negativajn aspektojn de la aborigena kredsistemo. Ekzemple, la triba socio estas krude seksisma. La sanktaj sekretoj haveblas nur al la viroj. Do, same kiel en la plimulto de organizitaj religioj, la religia potenco daŭrigas la povojn kaj rajtojn de la viroj super la virinoj kaj infanoj. Kaj ju pli aĝaj, des pli potencaj. La punoj kontraŭ misfaruloj naŭzas min. Ekzemple, la Aranda tribo de centra

Aŭstralio punas per amasa seksperforto virinon kiu vidis sanktan objekton.

La libro enhavas multe pli ol tio kion mi ektuŝis. En la fina ĉapitro Donald kuntiras kaj konkludas. Skrupule honesta, li respektas nian propran juĝkapablon, sen trudi ian verŝajnigan "sanktan" retorikon. *The Mystical Chorus* scintilas. Se vi aĉetos nur unu libron ĉi-jare aĉetu ĉi tiun. Kaj donacu ekzempleron al via plej bona amiko. La formato estas tute plaĉa; la vernisa, blua kovrilo allogos la okulon; kaj la enhavo stimulos kaj evoluigos vin, escepte se vi jam scias ĉion! ❑

NOVE APERIS

Mi memoras Hiroŝimon, de Stephen Kelen. Tradukis Ralph Harry. 78p., ilustrita; broŝurita. Aŭstralia Esperanto-Asocio 1995.

Ĉi tiu verko unue aperis anglalingve en 1983; la esperanta eldono aperis 50 jarojn post la eksplodo de la atombombo super Hiroŝimo. Ne longe post tiu eksplodo, Stephen Kelen vizitis la urbon. Ĉi tiu libro enhavas liajn spertojn kaj pensojn rezultintajn de tiu vizito.

BONVOLU KOREKTI


En nia juli-aŭgusta numero (*ESK* 16 p.22) ni miskopiis la nombron kaj averaĝan daŭron de la Esperanto-programoj de radio 3ZZZ. La ĝusta kalkulo estas: 302 programoj, el kiuj 37 po 15 min., 230 po 30 min., 31 po 60 min., kaj 4 programoj kun 40, 45, 75, kaj 90 min.

En la sama numero, en la artikolo pri Jeanie Wilson, p.3, kol.2., alineo 2, ŝi ne estis la baptopatrino de la bebo. La bebo estis nepo de ŝia nova edzo. Ŝi estis, do, simple (bo)avino. (Redakta eraro; pardonpeton al Gwenda Sutton.)



DANKON AL QUANTAS

Ni dankas al Quantas, kiu donacis $400 da ŝarĝspaco por transporti niajn esperantajn reklambroŝurojn pri Sud-Aŭstralio al la UK en Tampereo. Tiuj broŝuroj, presitaj laŭ donaco de la Sudaŭstralia Turisma Oficejo, celas konigi la ŝtaton de la UK 1977 al la monda esperantistaro. ❑



desegnis Igorj Sitnikov

DIALOGOJ DE LA DIOJ

de Lukiano
Tr. José F. Martín del Pozo
(daŭrigo)

(Dialogo 11: Afrodita parolas kun Selena)

Afrodita: Unufoje, li portis min al Ida Monto, pro Anĥizo la Iliona, alifoje al Lebanono, pro tiu Asiria knabo, kiu enamigis ankaŭ Persefonan kaj forprenis de mi duonon da amato; tiel, ke mi multfoje minacis lin, ke mi frakasos lian arkon kaj la sagujon kaj elradikigos liajn flugilojn, se li ne ĉesos fari tion. Mi eĉ batis lian pugon per miaj sandaloj. Sed mi ne scias kiel li, komence timanta kaj plorpetanta, post nelonge ĉion forgesis. Sed diru al mi, ĉu Endimiono estas bela? Se jes, malbono estas suferebla.

Selena: Li ŝajnas al mi tre bela, Afrodita, precipe kiam li deprenas la klamidon kaj dormas sur la petroj, kun la sagetoj en sia maldekstra mano, kiuj glitas el ĝi, kaj la dekstra, fleksita ĉirkaŭ la kapo, enkadrigas la vizaĝon dum, superregita de la dormo, li elspiras tiun ambrozian spiron sian. Tiam mi descendas senbrue kaj piedpinte paŝas, ke li ne vekiĝos kaj timiĝos... vi scias; sed, kial mi devus diri al vi la sekvaĵojn? Nur, ke mi mortas pro amo.

Dialogo 12: Afrodita kaj Eroso

Afrodita: Eroso, filo, vidu kion vi faras. Mi ne parolas pri tio, kion vi faris surtere, kiel vi persvadas la homojn agi kontraŭ si aŭ kontraŭ aliaj, sed pri tio, kion vi faris ĉiele: vi montris vin multforma al Zeŭso, iĝante kia vi volas en ĉiu okazo; vi descendigas Selenan el la ĉielo; foje, vi eĉ igas Helion resti ĉe Klimena, senkonscia pri sia vojo. Kiel vi ofendis min, vian patrinon, per aŭdacaj faroj. Sed vi, aŭdaculo, eĉ Rean, maljunulinon kaj patrinon de tiel gravaj dioj, konvinkis, ke ŝi pederas-tiu kaj enamiĝu al tiu Frigia knabo; nun, pro vi ŝi freneziĝis, jungis la leonojn, kaj kun la Koribantoj, kiuj ankaŭ frenezas, iras supren-malsupren en Ida Monto, ŝi lamentas pro Atiso, dum, el la Koribantoj, unu vundis per ponardo la kubuton, alia malligis la harojn kaj kuras freneze sur la montaro, freneziĝinte, alia blovas la kornon, alia ludas la timpanon aŭ frapas cimbalon. Unuvorte, en Ida Monto ĉio estas tumulta kaj freneza. Mi timas, mi kiu naskis tiel grandan malbonon, ke Rea iom freneziĝos, aŭ pli ĝuste, estos denove si mem kaj ordonos al la Koribantoj, ke ili kaptu kaj disŝiru vin, aŭ ke ili ĵetu vin al la leonoj; mi timas tion, kiam mi vidas vin en danĝeroj.

Eroso: Ne timu, patrino, ĉar mi jam familiariĝis eĉ kun tiuj leonoj, mi tre ofte rajdis sur iliaj dorsoj kaj tirante la kolhararon mi brid-as ilin, kiuj karesas min kaj permesas al mi meti la manon en iliajn buĝojn, kaj kisas ĝin. Pri Rea, kiam ŝi povus okupiĝi pri mi, se ŝi ĉiam estas kun Atiso? Tamen, kiel mi maljustas, montrante belaĵojn kiaj ili estas? Ĉu vi ne deziras belaĵojn? Do ne akuzu min pri tio! Aŭ ĉu vi volas, patrino, ne plu ami Areson aŭ ke li ne plu amu vin?

Apolono: Kiel timinda vi estas! Kiel vi mastras ĉion! Sed vi iam memoros miajn vortojn.

Dialogo 13: Zeŭso, Asklepio kaj Heraklo

Zeŭso: Ĉesu, Asklepio kaj Heraklo, kvereli unu kontraŭ la alia kvazaŭ homoj; tio estas nekonvena kaj stranga en la bankedo de la dioj.

Heraklo: Ĉu vi volas, Zeŭso, ke tiu ĉi apotekisto havu pli bonan lokon, ol mi?

Asklepio: Je Zeŭso, mi pli bonas.

Hera: Rilate kion, sensenculo? Pro tio, ke Zeŭso fulmovundis vin kiam vi faris nelicaĵon kaj nun atingis senmortecon pro kompato?

Apolono: Ĉu ankaŭ vi, Heraklo, forgesis vin mem brulantan en Ojto, kaj riproĉas min pri la fajro?

Hera: Ĉu eble ni travivis samon? Mi estas filo de Zeŭso. Kiom mi suferis purigante mian vivon, batalante kontraŭ bestoj kaj punante arogantulojn! Vi, tamen, estas radiktranĉisto kaj ĉarlatano, eble utila al malsanuloj per la aplikado de medikamentoj, sed vi ne montriĝis vireca.

Apolono: Vi pravas, ĉar mi sanigis viajn brulvundojn, kiam antaŭnelonge vi soris duonbrulita pro la kitono kaj pro la flamoj; sed almenaŭ mi neniam sklavis kiel vi nek kardis lanon en Lidio, purpure vestita, kaj frapita de Omfala per ora sandalo, nek kolera mortigis miajn gefilojn kaj edzinon.

Hera: Se vi ne ĉesos insulti min, vi tuj scios, ke la senmorteco malmulte utilos al vi, ĉar mi kaptos vin kaj elĵetos el la ĉielo sur la kapon, tiel ke eĉ Peano ne povos sanigi vian kranion frakasitan.

Zeŭso: Ĉesu! Mi ordonas, kaj ne perturbu nian asembleon, aŭ mi elpelos vin ambaŭ el la bankedo. Krome, Heraklo, bonsencas ke Asklepio havu pli bonan lokon ol vi, ĉar li mortis pli frue.

Dialogo 14: Hermeso kaj Apolono

Hermeso: Kial vi estas trista, Apolono?

Apolono: Ĉar mi ne havas bonŝancon ami, Hermeso.

Hera: Tial ja indas tristi; ĉu vi ne bonŝancas? Ĉu la afero de Dafna ankoraŭ ĉagrenas vin?

Apolono: Neniel; mi priploras tiun Spartanon, la Ebalidon.

Hera: Diru, ĉu Jacinto mortis?

Apolono: Jes ja.

Hera: Kial, Apolono? Kiu estas tiom neamema por mortigi tiun belan knabon?

Apolono: Mi kulpas.

Hera: Ĉu vi freneziĝis, Apolono?

Apolono: Ne, sed okazis senintenca misfortuno.

Hera: Kiel? Mi volas aŭskulti kiel.

Apolono: Li lernis ĵeti diskon, kaj mi ĵetis kune kun li, mortigante lin pro la plej perversa el la ventoj, la Zefiro, kiu amis lin de antaŭlonge, nereciprokite, kaj neeltenante la malakcepton; mi ĵetis, kiel ni kutimis, la diskon supren, kaj li, ekblovante suben, puŝis la diskon al la kapo de la knabo, tiel ke multa sango fluis pro la impakto kaj la knabo tuj mortis. Sed mi tuj punis lin per miaj sagoj, sekvante lin ĝis la monto; mi starigis tumulon por Jacinto en Amiklo, kie la disko faligis lin; kaj mi igis la teron elkreskigi el la sango plej belan floron, Hermeso, plej delikatan el ĉiuj floroj kun plenda enskribo pri li. Ĉu mi ŝajnas al vi senracie afliktita?

Hera: Certe, Apolono; vi sciis ke vi enamiĝis al mortemulo; do, ne lamentu pro lia morto.

Dialogo 15: Hermeso kaj Apolono (pri Hefesto)

Hermeso: Ĉi tiu, kvankam lama, kaj krome forĝisto, edzinigis la plej belajn, Afroditan kaj Karisan, Apolono!

Apolono: Bonŝancon, Hermeso! Mirigas min nur, ke ili eltenas esti kun li, antaŭ ĉio, kiam ili vidas lin ŝpruce ŝviti, kliniĝi sur la forĝoforno, kun multa fulgo survizaĝe; tamen, ili ĉirkaŭbrakumas kaj kisas lin kaj dormas kun li.

Hera: Pro tio mi indignas kaj envias Hefeston; vi flegu vian hararon kaj ludu la citron kaj fieru pri via beleco kaj mi pri mia mieno kaj la liro; ĉar, kiam estas tempo enlitiĝi, ni dormas solaj.

Apolono: Cetere, mi estas malbonŝanca ame; ĉar mi amis du, Dafnan kaj Jacinton; Dafna tiel malamis min, ke ŝi preferis iĝi arbo ol kuniĝi kun mi; Jacinton mi mortigis per la disko. Nun, anstataŭ ilin, mi havas kronojn.

Hera: Mi iam kun Afrodita... sed nepras ne fanfaroni.

Apolono: Mi scias, kaj onidire ŝi naskis al vi Hermafroditon. Sed diru al mi, se vi scias, kiel Afrodita ne ĵaluzas pri Karisa aŭ Karisa pri Afrodita?

Hera: Ĉar tiu loĝas kun li en Lemno kaj Afrodita en la ĉielo, Apolono. Krome, plejofte ŝi estas kun Areso kaj tiel enamiĝis al li, ke la forĝisto malmulte gravas al ŝi.

Apolono: Ĉu vi opinias, ke Hefesto scias tion?

Hera: Li scias; sed kion li povus fari al tiu forta junulo, kiu krome estas soldato? Do, li rezignacias. Li nur minacas teksi kaptilon per kiu li kaptos ilin sur la lito, kvazaŭ per reto.

Apolono: Mi ne scias; mi ŝatus esti tiu kaptota.

(daŭrigota)

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOVZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Kotizoj: Aŭstralia Esperanto-Asocio: AŬ$30 por individuo aŭ klubo, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso; $20 (minimume) por studento aŭ pensiulo. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto (adreso sur paĝo 2).
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio : NZ$40 por individuo; $50 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo po $1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto (adreso sur paĝo 2).

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estis perkomputile kompostita kaj enpaĝigita de Donald Broadribb, per Macintosh LC III, uzante Nisus®Writer kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt (Altsys Corp.), kaj Orion Esperanto 16pkt (disponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.